







EL POPOLA ĈINIO

中國新運

7 1981

Tablotenisaj Steloj de Ĉinio



En vilaĝo de sani-oj

de QU WEIBO



Danco kun trikorda muzikilo

La sani-oj loĝas en Lunan, Mile, Yiliang k.a. en Yunnan-provinco de Ĉinio. Tie estās la hejmloko de la fama heroino Aŝma en folkloraj rakonto.

La sani-oj sin okupas ĉefe pri terkulturo, kaj ankaŭ pri brutobredado. Iliaj vilaĝoj lokiĝas plejparte sur montdeklivoj kun pinoj kaj bambuoj. La sani-aj virinoj estas lertaj en teksado kaj brodado, kaj ŝatas brodi sur siaj vestoj diversajn desegnojn. Precipe la kapornamajoj de la knabinoj broditaj el diverskoloraj silkaj fadenoj estas tre belaj.

La sani-aj junuloj ŝatas lukton. En festo aŭ senlaboraj tagoj ili okazigas konkurson de lukto en vilaĝo, kaj ĝin partoprenas ankaŭ vilaĝanoj el ĉirkaŭaĵo. Ĉiuj viroj kaj virinoj, ĉu junaj aŭ maljunaj, portas festajn vestojn. La junuloj ludas trikordan muzikilon kaj la knabinoj kantas kaj dancas laŭ la bela melodio. Per tio ili verŝas sian amon unu al alia. Tia aktivado donas bonan ŝancon por interamikiĝo de gejunuloj kaj okazas plurfoje ĉiujare.

Lukto






Foiro



Amkanto



Al luktejo



Teksado

Sani-aj knabinoj en brodado



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Tablotenisaj steloj de Ĉinio
de **YANG CHANGZHONG** kaj
BAI WEIYIN

SUR LA DORSKOVRILO:

Lijiang-rivero en printempa pluvo
(ĉinstila pentraĵo) de **ZHANG
DENG TANG**

KOLORAJ SERIOJ:

En vilaĝo de sani-oj
Ĉe Fuchun-rivero
Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de
E-istoj:
Aŭtuno kaj vintro en la montoj
de la Nordokcidenta Svedio
La kanto kaj danco de uĝuroj
Arhatoj en Qiongzhu-templo

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Tangshan en rekonstruado
La Nanjing-a Unia Teologia Se-
minario remalfermita
Por beligi virinojn
Naciaj sportoj

Forpasis granda ĉina literaturisto Mao Dun	2
Memore al kamarado Mao Dun	4
Himno al la poplo (Eseo)	7
Ĉinaj getablotenisistoj en la ĉampionea konkurso en Novi Sad	8
SPORTO	10
INTER NI: El leteroj de niaj legantoj	10
KORESPONDI DEZIRAS	12
Tangshan hodiaŭ	12
Por savi knabinon	17
Mistero de "sovaĝuloj"	19
Zamenhof ne estis monavida	21
NIA KULTIVEJO: Rememoro pri mia patro K. Ĉ. Sun	23
Bakin elektita kiel aganta prezidanto de ĈVA	24
VIDINDAJ LOKOJ: Pejzaĝoj de Fuchun-rivero	25
ESP-NOVAĴOJ	27
Bivisto Liu Dehai	29
Memore al hinda verkisto Tagore	31
SUR NIA LIBROBRETO: "La historiaj radikoj de nealianciĝo"	32
Thomas Alva Edison ŝerce kaj serioze	33
Majkanto (poemo)	36
Memore (poemo)	36
Ŝveliĝas la nombro de la urbaj loĝantoj de la mondo	37
KURANTAJ AFEROJ	39
KULTURAJ NOTOJ	39
AMIKECO: Semanto de amikeco	40
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: Xi-an-a Evento	42
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: La festivalo de ĝingpo-oj	44
TRA LA MONDO:	
La internacia flor-merkato	46
Sensitiv-flora festo de Jugoslavio	47

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Mao Dun verkas hejme.

LA 27-an de marto, 1981 falis granda stelo de la ĉina literatura rondo. Forpasis Mao Dun, pioniro de la ĉina moderna progressa kulturo kaj granda literaturisto.

Mao Dun estas plumnomo de Shen Yanbing, kiu naskiĝis en Tongxiang-gubernio, Zhejiang-(Gegiang)-provinco, en 1896. Li estis vicprezidanto de la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, honora prezidanto de la Federacio de Ĉinaj Literaturistaj kaj Artistaj Rondoĵoj kaj prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Verkistoj. Li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en 1921 kaj estis unu el ĝiaj plej fruaj membroj.

Same kiel Lusin kaj Guo Moruo, li estis pioniro kaj fondinto de la ĉina moderna literaturo.

En 1920 li kune kun famaj verkistoj Zheng Zhenduo, Ye Shengtao kaj aliaj organizis la Literaturan Studrondon, kiu porpledis la realisman literaturon por la homa vivo. La revuo "Xiaoshuo Yuebao" redak-

tita de li fariĝis ĉefa tribuno de la realisma literaturo kaj havis grandan influon sur la novan literaturan movadon de Ĉinio.

En 1930 li kune kun Lusin organizis la Union de Ĉinaj Maldekstraj Verkistoj kaj multe kontribuis al la disvolvo de la ĉina revolucia literaturo, unuigo kaj grandigo de la revolucia literatura vicaro kaj rezisto kontraŭ la kultura subpremo fare de Kuomintango.

Post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito Mao Dun unuigis vastajn amasojn de kulturaj progresemuloj en la regiono regata de Kuomintango por fari nacisavan laboron. Li redaktis la revuon "Literatura Pozicio" kaj per tio akcelis la disvolviĝon de la kontraŭjapana literaturo. En malfacilaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito li iris al Yan'an (Jan'an), la tiama revolucia centro, por doni lekciojn.

Post la venko de la rezistmilito, malgraŭ la subpremado de la kuomintangaj reakciuloj, li persistis en demokratio kaj paco, oponis kontraŭ aŭtokratio kaj in-

SONG HONG:

Forpasis

terna milito kaj daŭrigis sian revolucian literaturan aktivadon.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, li longe okupiĝis pri la kultura afero kaj gvidis ĉinajn literaturan kaj artan rondojn. Li verŝis grandan energion por helpi junajn literaturistojn kaj faris grandan kontribuon al la socialisma kultura afero.

Dum pli ol 60 jaroj de sia literatura agado, li ĉiam fervore prikantis la popolon kaj akre skurĝis la mallumajn fortojn de la malnova Ĉinio. Li verkis grandan nombron da elstaraj literaturaĵoj, kiaj "Meznokto"*, "Eklipto", "Printempaj Silkraŭpoj" kaj "La Butiko de la Familio Lin". Per tiuj verkoj li prikskribis la malfacilan vojon de la ĉina demokratia revolucio, prezentis gigantan bildon de la historio, pliriĉigis la trezorejon de la ĉina literaturo, altigis la nivelon de kreo de la realisma literaturo kaj tiel faris neforviŝeblan kontribuon por la historio de la ĉina literaturo. Multaj el liaj verkoj estis tradukitaj en diversajn fremdajn lingvojn. Kaj krome, li verkis ankaŭ grandan nombron da libroj pri literaturo kaj ĉinigis multajn fremdlandajn verkojn, precipe tiujn de subpremataj nacioj.

Granda Ĉina

Literaturisto Mao Dun

Mao Dun kun siaj legantoj en la libro-foiro aranĝita en la Beijing-a Kultura Palaco de Laboruloj, 1957



Mao Dun kaj lia nepino en Shanghai, 1955




En siaj lastaj jaroj li persistis en verkado de rememoroj malgraŭ sia debileco, maljuneco kaj tre malbona vidkapablo. Li planis skribi la rememorojn de 1916-1949. Estas domaĝe, ke li nur finis la parton pri la 20-aj jaroj kaj dormis per la fera dormo. Tio estas granda perdo por la ĉina literatura rondo.


Antaŭ sia morto Mao Dun testamentis 250,000 juanojn al la Asocio de Ĉinaj Verkistoj kiel fonduson de literatura premio por la plej elstaraj ĉinaj romanoj de ĉiu jaro.

Ĉiu, kiu konas la historion de la ĉina Esperanto-movado, scias, ke en Ĉinio la disvastigo de Esperanto estis ligita kun la progresiva kultura movado. Lusin, Guo Moruo kaj Mao Dun aprobis Esperanton. Frue en sia diskonigo de la literaturo de subpremataj nacioj, Mao Dun jam donis atenton al Esperanto. En sia gratulo adresita al la Chongqing-a Koresponda Esperanto-Lernejo en 1944 li skribis: "Esperanto havas noblan idealon, nome por la intereso de la vastaj popolamasoj, por pli bona estonteco de la homaro kaj por la efektiviĝo de la 'granda rondo familia'".

En 1959 la Ĉina Esperanto-Ligo konsiliĝis kun li pri eldo-



Mao Dun (la meza), Guo Moruo (la unua de maldekstre), Hong Shen (la dua de maldekstre) kaj Ye Shengtao (la dua de dekstre) en Shanghai, 1946



Mao Dun lekciiis en la Lusin-a Arta Instituto de Yan-an en 1940.

nado de la “Ĉina Antologio”. Li opiniis signifoplena laboron prezenti ĉinajn elstarajn literaturajn verkojn al la monda esperantista publiko. Li mem elektis la esperantigindajn pecojn kaj verkis antaŭparolon por la antologio. Li donis antaŭparolon ankaŭ al la esperantigita nove-

laro “Por Nova Afero Nova Maniero”.

Kelkajn monatojn antaŭ sia morto, laŭ la peto de la Ĉina Esperanto-Ligo, li kun plezuro manskribis ĝian nomon en la ĉina lingvo por ĝia elpendaĵo kaj tio estas valora memorajo postlasita de li al ni.

La ĉina popolo ĉiam karmemoros la literaturan giganton Mao Dun! Kaj ankaŭ la ĉina esperantistaro ĉiam karmemoros lin, kiu varme aprobis la lingvon Esperanto!

* Ĝia fragmento aperis en la n-ro 10 de nia gazeto, 1980.

Memore al Kamarado Mao Dun

de BAKIN

MARTE de 1978, kiam mi ĉeestis kunvenon en Beijing, mi vidis k-don Mao Dun. Tio sentigis al mi apartan intimecon. Tiam li estis ankoraŭ tre vigeplena kaj parolema, kvazaŭ li ne estus grandaĝulo. Pro tio mi tre ĝojis. Dum la lastaj tri jaroj mi plurfoje intervidiĝis kun li, iafoje en la Popola Halo, kie tamen mankis al ni la ŝanco por longa interparolo, kaj aliafoje en lia hejmo, kie ni povis libere kaj senĝene paroli. En tiuj momentoj mi sentis min kvazaŭ reveninta en la tagojn de la tridekaj jaroj. Ĉiufoje mi

volis sidi ĉe li pli da tempo, sed mi timis, ke tio lacigos lin. Je la adiaŭo mi ofte sentis, ke mi havas ankoraŭ multajn vortojn por diri, kaj pensis, ke mi diro tion en la venonta fojo. En la kontakto kun li mi jam trovis, ke li maljuniĝis jaron post jaro, tamen li havas nenian maltrankviligan malsanon, krom iom malfacila irado. Kaj ankaŭ mi maljuniĝas jaron post jaro, tial mi ĉiam pensis pri la “venonta fojo” kaj opiniis, ke mi havos multajn ŝancojn por interparoli kun li. Antaŭ nelonge iu diris al mi: “La respektinda s-ro Mao fartas nebene kaj jam enhospitaliĝis.” Mi nature pensis, ke vintro ĉiam malfavoras la sanon de maljunuloj, kaj li certe resaniĝos kiam varmiĝos. Mi neniam ŝanceliĝis en mia kredo revidi lin en la “venonta fojo”. Sed estis neatendite, ke la telefono informanta lian forpason finis al mi la ŝancon de la “venonta fojo” por ĉiam.

Post sia reformo en 1921, la monata gazeto “Xiaoshuo Yuebao” eldonata de la Komerca Presejo* ekaperigis novajn literaturarojn, kaj k-do Mao Dun fariĝis ĝia unua redaktoro. Tiam mi estis en la urbo Chengdu kaj tre ŝatis legi novelojn de subpremataj nacioj, tradukitajn kaj rekomenditajn de li. Kiam li aperigis sian trilogion de romanoj “Eklipso” sub la plumnomo Mao Dun en la gazeto en 1928, mi studis en Francio. Mi tre admiris tiun novan romaniston. Post kiam mi revenis al la patrujo, mi sciigis, ke tiu Mao Dun estis neniu alia ol la antaŭa redaktoro de la gazeto. En la tridekaj jaroj, kiam mi vidis lin en Shanghai, mi jam nomis lin “Sinjoro Shen” (Shen estas familia nomo de Mao Dun), kaj

mi tiel nomis lin ĝis nia lasta renkontiĝo. Mi ĉiam prenis lin kiel mian instruiston. Kiam mi estis dekkelkjara, mi jam eklegis liajn literaturajn disertaĵojn kaj tradukaĵojn. Kaj en la tridekaj jaroj mi ŝatis legi liajn recenzojn pri verkistoj kaj iliaj verkoj. En tiuj jaroj li batalis per plumo, starante ĉe la flanko de Lusin, kaj edukis gejunulojn per siaj verkoj. Nun mi ankoraŭ bone memoras la scenon de konkura aĉetado de lia ĵus aperigita romano “Meznokto” en 1932 en Shanghai. Ĝia eldono estis la alia granda venko de nia moderna literaturo post la romano de Lusin “La Ĉefa Historio de A-Q”. En tiu periodo li aperigis sinsekve plurajn realismajn novelojn kiaj “La Butiko de la Familio Lin” kaj “Printempaj Silkraŭpoj”. La kresko de la ĉina moderna literaturo sur la realisma vojo “por la homa vivo” estas nedisigebla kun liaj klopodoj dum dekoj da jaroj. Krom verkado, li ankaŭ tradukis verkojn de nemalmultaj fremdlandaj verkistoj kaj enkondukis en Ĉinion multajn

mondfamajn literaturarojn. En la tridekaj jaroj li kaj s-ro Lusin fondis la influan monatan gazeton “Tradukoj”. Kiel maljuna diligenta ĝardenisto, li zorgeme flegadis ekflorintajn florojn en la literatura kaj arta ĝardeno dum kelkdek jaroj. Ĉi-rilate li ankaŭ postlasis al ni valorajn artikolojn.

Nur hazardo kondukis min sur la literaturan vojon. Mi kaj verkis kaj lernis. Dum dekoj da jaroj mi lernis de verkistoj de la malnova generacio multon pri verkado kaj konduto. Mi ankoraŭ memoras renkontiĝojn aranĝitajn de la Shanghai-a Literatura Societo en la meza periodo de la tridekaj jaroj, kiujn ĉeestis iam s-ro Lusin kaj k-do Mao Dun. Ili parolis pri la stato de la literatura rondo kaj nia vojo. Tiam mi nur aŭskultis absorbite, kaj eĉ hodiaŭ mi ankoraŭ ofte ekmemoris pri tiu lernŝanco malfacile akirebla.

Tamen mi ne estis bona lernanto, mankis al mi penemo en studado, tial post dekoj da jaroj

Bakin (la maldekstra) kaj Mao Dun



mi ne atingis rimarkindajn sukcesojn en la literaturo. Pro tio mi ĉiam sentas bedaŭron. Post kiam la rezistmilito kontraŭ Japanio eksplodis en Shanghai je la 13-a de aŭgusto de 1937, ĉesis eldoni literaturaj kaj artaj gazetoj. Post tio la redakcioj de la "Literaturo" kaj aliaj tri gazetoj kune fondis la semajnan revuon "Krioj". Ni interkonsiliĝis pri tio en la hejmo de Li Liewen** kaj unuanime elektis s-ron Mao Dun kiel ĝian redaktoron. Post nur du numeroj ĝi estis malpermesita je la ordono de la policejo de fremdlanda koncesio, kaj poste ĝi sukcesis daŭre aperadi nur sub alia titolo. Ni akurate alportis la kontribuojn al la hejmo de Mao Dun. Nelonge poste li forlasis Shanghai kaj mi anstataŭe plenumis lian laboron. Nur tiam mi trovis, ke ĉiuj artikoloj estis klare korektitaj de li per ruĝa krajono, sen ajna malfacile rekonebla vorto. Ankaŭ mi redaktis gazeton kaj kompilis librojn, tamen mi neniam tiel zorgeme korektis artikolojn por aliaj. Vidante la artikolojn transdonitajn de li, mi admiris lian laboron kaj komprenis, ke la redaktado estas nefacila. En la sekvinta printempo li redaktis en Xianggang (Hongkong) la gazeton "Pozicio de Literaturo kaj Arto", kiu estis presita en Guangzhou (Kantono), tial li ĉiusemajne venis al la urbo por korekti provaĵojn. Li loĝis en la hotelo Aiqun de Guangzhou, kaj tiam ankaŭ mi estis en la urbo. Ĉiufoje, kiam mi vizitis lin en la hotelo, mi vidis, ke li absorbite laboris super korektado. Mi longe min okupis pri korektado, tamen ankoraŭ restis eraroj en la artikoloj prilaboritaj de mi. Kiam mi ekmemoris mian malzorgemon en la laboro,

mia koro pleniĝis de pentoj kaj aperis antaŭ mi la sceno pri korektado de provaĵoj fare de k-do Mao Dun en la hotelo, kaj la artikoloj korektitaj de li per ruĝa krajono. Li faris ĉiun laboron kun granda seriozeco, estis same ankaŭ en skribo de "Rememoroj" en lia lasta tempo. La "Rememoroj" estas majstra verko nefinita de tiu granda realisma verkisto. Kuŝante malsanule sur la lito, li ne forgesis sian verkadon, eĉ duonsveninte li ankoraŭ tenis sin en pozo de skribado. Ĝis sia lasta spiro li ne formetis sian plumon.

Kiam homo atingas la aĝon de siaj lastaj jaroj, li traktas morton aŭ vivon ne tiel klare kaj akre, nek sentas tiel grandan doloron kiel mezaĝuloj pro morto de siaj parencoj kaj amikoj, ĉar li opinias, ke li baldaŭ atingos la mortinton. Sed la informo pri la forpaso de k-do Mao Dun multe malĝojigis min. Li estis reprezentanto kaj ekzemplo de niaj samtempuloj. Li postlasis nemalmultajn valorajn riĉaĵojn al la patrio kaj la popolo, kaj pro tio li devis havi neniun bedaŭron. Sed mi? . . . Mi tre dezirus reteni lin, por ke li finu ĉion kion li volis skribi!

Marte de la pasinta jaro, antaŭ ol mi ekveturis al Japanio, mi vizitis k-don Mao Dun en lia domo. Ni havis unuhoran interparoladon en lia vasta kaj pura legoĉambro. Lin vizitis kune kun mi ankaŭ k-do Kong Luosun***. Inter ni k-do Mao Dun paroladis plej multe, li parolis vigle pri sia pasinteco, pri la iluzio estiĝinta post kiam li falis lastfoje en sia dormoĉambro. Mi ne volis disiĝi de li, tamen mi ne povis ne lasi lin ripozi. Post adiaŭo al ni, li iris al la dormoĉambro subtenate de sia

bofilino. Elirinte el la postkorto, mi forportis la figuron de soleca maljunulo. En la lastaj du jaroj ĉiam prezentiĝis antaŭ miaj okuloj la figuro de la soleca maljunulo. Fakte, mi ne komprenis lin. Hodiaŭ mi legis lian testamenton, en kiu li decidis donaci grandan sumon el sia honorario kiel literaturan fonduson por premioj romanojn. Je la kriza momento de sia malsano li skribis jene: "Mi mem scias, ke mi ne plu povas leviĝi, kaj mi kore deziras grandan prosperon al la socialisma literatura afero de nia lando." Li ĉiam entenis en sia koro la literaturan aferon de la patrio, kaj al ĝi li dediĉis sian tutan vivon. Ĉu li povis senti solecon?

Je la fino mi volus mencii la sintenon de k-do Mao Dun al Esperanto. Kiel supre dirite, en sia frua tempo li jam metis grandan atenton sur konigon de la literaturaĵoj de la subpremataj nacioj. Tiam nemalmultaj literaturaĵoj de la subpremataj nacioj estis enkondukitaj en Ĉinion pere de Esperanto, tial li bone sciis la rolon ludatan de Esperanto en la internacia kultura interŝanĝo. Same kiel literaturaĵoj Lusin kaj Guo Moruo, li simpatis kaj subtenis Esperanton. Mi malĝojas pro la forpaso de tiu sincera amiko de Esperanto.

* *La Komerca Presejo estas ĉina eldonejo fondita en Shanghai en 1887.*

** *Li Liewen estis amiko de la aŭtoro en la tridekaj jaroj en Shanghai. Depost 1945 li lekciiis kiel profesoro en la Taiwan-a Universitato kaj mortis de malsano en 1972.*

*** *Kong Luosun estas ĉefredaktoro de la literatura kaj arta gazeto "Wen Yi Bao".*



Himno al la Poplo



(Eseo)

VERE neordinara estas la poplo.
Ĝin mi admiras!

Kiam via aŭto kuregas sur la senlima altebenaĵo, viajn okulojn plenigadas granda tapiŝo flava kaj verda. La flavajo estas tero, virga tero — krusto de la loesa altebenaĵo, akumule formita per la granda natura forto antaŭ centmiloj da jaroj. Kaj la verdaĵo estas frukto de la homa batalo kontraŭ la naturo, tritikkampoj, kiuj rulas verdajn ondojn en zefiro. En tiu momento vi sentas koran admiron pri la vorto "tritikondoj" kreita de niaj antaŭuloj, aŭ eltrovaĵo de majstro aŭ kremo de zorge flegita lingvo. La flavo kaj verdo regas ĉie sur la senlima ebenaĵo. Tiam vi forgesus ke via aŭto veturas sur altebenaĵo, se la ĉeno de malproksimaj montoj ne rimarkigus vin pri tio (en viaj okuloj tiuj montoj ja troviĝas sub viaj piedoj). Pro tia pejzaĝo en via cerbo eble aperas la vortoj "impona", "granda" kaj similaj adjektivoj. Tamen viaj okuloj eble sentas samtempe iom laciĝon kaj fermiĝas antaŭ la grandioza pejzaĝo, dum enŝteliĝas en vian koron alia sento — monotono. Vere, monotono, iom da monotono, ĉu ne?

Sed kiel estos via dormemo, se tiu momente vi subite ĵetas rigardon antaŭen kaj vidas malproksiman vicon aŭ nur 3-5- opon aŭ 1-2- opon da arboj fiere starantaj kiel gardistoj? Tiam mi ekkriis mire pro ili.

Ili estas poploj, ĉie kreskantaj en nordokcidenta Ĉinio, tamen arboj vere neordinaraj!

Ili estas arboj bravaj kun rektaj trunko kaj branĉoj. Ilia trunko ĝenerale alta je ĉ. tri metroj estas tute senbranĉa, kvazaŭ pro flegado.

Ĉiuj iliaj branĉoj faske kunpremiĝantaj sin direktas supren tute sen escepto, kvazaŭ pro flegado; ankaŭ ĉiuj iliaj larĝaj folioj direktiĝas supren, preskaŭ sen oblikve kreskantaj por ne paroli pri pendantaj; kaj ilia ŝelo glata kun arĝentaj cirkloj montriĝas pale blua. Ili estas arboj rekte starantaj kun obstineco spite al la neĝvento en la Nordo! Eĉ se ilia trunko havas dikecon nur de bovlo, tamen ili kreskas supren ĝis alteco de 10-20 futoj kaj malcedeme rezistas kontraŭ la frosta vento.

Jen la poplo, kreskanta ĉie en la Nordokcidento, sed absolute ne ordinara. Eble vi diras, ke ĝi ne estas bela pro la manko de gracieco kaj gustoriĉaj sinuoj de la branĉoj. Se beleco signifus nur graciecon aŭ flanken-etendiĝantaj frondojn, poplo ne povus esti kalkulata kiel belulino en la arba mondo; tamen ĝi estas vere granda, honesta, simpla kaj serioza, kaj samtempe al ĝi ne mankas mildeco, por ne paroli pri ĝiaj nefleksebleco kaj rekteco. Ĝi estas brava viro en la arba mondo! Kiam vi trapasas la altebenaĵon kovritan de neĝo ekdegelinta, kaj vidas alte starantan poplon aŭ vicon da tiaj arboj sur ebenaĵo, ĉu vi sentas, ke ili estas nur arboj? Ĉu vi ne pensas, ke iliaj simpleco, seriozeco kaj nefleksebleco almenaŭ simbolas la kamparanojn en la Nordo? Ĉu vi neniom imagas al vi, ke sur la vasta postfronto de la malamiko ĉie defendas sian hejmlokon la neflekseblaj gardistoj fiere starantaj kiel poplo? Ĉu vi ne imagas al vi pli profunde, ke la poplo progresema kun kompakte kuniĝantaj branĉoj kaj folioj ja simbolas la spiriton kaj volon, kun

kiuj oni brave batalas sur la Nord-ĉinia Ebenaĵo kaj skribas la historion de la nova Ĉinio per sia sango?

La poplo estas arbo neordinara. Ĝi troviĝas ĉie en la Nordokcidento kaj estas ne alte taksata kiel la kamparanoj en la Nordo; ĝi ankaŭ havas fortan vivipovon kaj estas ne elturmentebila nek venkebla per subpremado same kiel la kamparanoj en la Nordo. Mi prikantas ĝin ne nur pro tio, ke ĝi simbolas la kamparanojn en la Nordo, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi simbolas la simplecon, firmecon kaj progresemon nemalhaveblajn en la batalo por la nacia liberigo.

Admiru noblecan nanmu-arbon (ankaŭ altan kaj belan) kaj malrespektu la ofte vidatajn kaj kreskemajn poplojn tiuj, kiuj subtaksas kaj malestimas la popolamasojn kaj obstine regresas, sed mi laŭte prikantas la poplon!

** Tiu ĉi artikolo estis verkita en marto de 1941. Tiam la Kuomintangaj reakciuloj pasive rezistis kontraŭ Japanio kaj aktive oponis kontraŭ la Kompartio, tiel ke la japanaj agresantoj povis koncentri siajn fortojn kaj fari frenezajn ĉirkaŭekstermadon al la kontraŭjapanaj bazlokoj. Sub la gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio la vasta popolamaso, unuanime kaj pene luktante, plurfoje frakasis ĉirkaŭekstermojn far la japanoj kaj puparmeoj, firmigis kaj disvolvis la kontraŭjapanajn kaj demokratiajn bazlokojn en la postfronto de la malamiko. La aŭtoro vidis, en la popolo de la bazlokoj, la brilan perspektivon de la ĉina nacio kaj verkis la artikolon por varme prikanti ĝin.*

Ĉinaj Getablotenisistoj en la Ĉampionecca Konkurso en Novi Sad

LA 36-a Monda Tablotenisista Ĉampionecca Konkurso okazis de la 14-a ĝis la 26-a de aprilo en Novi Sad, Jugoslavio. Post intensa konkurado Ĉinio gajnis la viran kaj virinan teamajn ĉampionecojn, ĉiujn ĉampionecojn kaj subĉampionecojn en kvin solludoj kaj la triajn lokojn en tri solludoj. Ke ĉiuj ĉampionecoj en la konkurso estis gajnitaj de unulandaj tablotenisaj teamoj, tio estis senprecedenca en la historio de la mondaj tablotenisaj ĉampioneccaj konkursoj kaj faris sensacion en la monda tablotenisista rondo.

Kial la ĉinaj teamoj atingis tiel bonajn sukcesojn? La kaŭzoj kuŝas en tio, ke la ĉinaj getablotenisistoj persistis ĉe sia tradicia ludmaniero de ĉetabla rapida atako unuflanke, kaj ellernis de eŭropaj tablotenisistoj la ludarton pri lopa drivado aliflanke, ke ili povis

ludi kun alta lerteco. Krome, la ĉinaj teamoj donis grandan atenton al debutintoj. El la kvin ĉinaj tablotenisistoj partoprenantaj la viran teaman konkurson, kvar estis debutintoj, kaj la tri ĉinaj tablotenisistinoj partoprenantaj la virinan teaman finalon havis meznombrojn aĝon de malpli ol 20 jaroj.

Ke la ĉinaj getablotenisistoj venkis siajn fortajn rivalojn, tio estis nedisigebla de ilia penema trejniĝo. Ĉu en bonaj aŭ malbonaj tagoj, ili kaj lernis ludarton kaj faris korpajn ekzercojn, kaj fine elbakiĝis tiel elstaraj ludistoj, kiel la nuna ĉampiono de la vira solludo Guo Yuehua kaj la nuna ĉampionino de la virina solludo Tong Ling.

Por kulturi unu ludist(in)on, kiu gajnos por Ĉinio la mondan ĉampionecon, multaj el la ĉinaj teamoj volonte servas por li (aŭ ŝi) kiel akompananto en

lia (aŭ ŝia) ekzercado de pilkludo. La helpludistoj serioze imitas la ludmanierojn de eminentaj mondaj tablotenisistoj por adapti la ĉefajn ĉinajn ludistojn al diversaj taktikoj. Ili ne ĉasis honoron nek privatajn interesojn, sed diligente laboras kiel nekonataj herooj. Kaj ĉiufoje, kiam la ĉefaj ĉinaj ludistoj ricevis premion, ĉiu el ili diris senescepte, ke li (aŭ ŝi) ricevis la premion ja en la nomo de la ĉina tablotenisista teamo.

Kiel ĉiuj scias, primara estis la startpunkto de la ĉina tablotenisista movado. Komence de la 50-aj jaroj, kiam la ĉinaj teamoj ĵus debutis sur la tablotenisista scenejo, ilia vira teamo gajnis nur la dekan lokon, por ne paroli pri ilia virina teamo. Sed en la 25-a Monda Tablotenisista Ĉampionecca Konkurso en 1959, Rong Guotuan la unua gajnis por Ĉinio la ĉampionecon de la

Entuziasmaj jugoslavaj spektatoroj



Tong Ling, ĉampiono de la virina solludo





Cinaj tablotenisistoj revenis en plena sukceso.

vira solludo. Antaŭe Eŭropo tenis la superecon de la tablotenisista ludo, la ludistoj de Hungario kaj aliaj eŭropaj landoj estis preskaŭ nevenkeblaj. En la 50-aj jaroj la japanaj tablotenisistoj rompis la defendon de la eŭropaj per atako en vertikale tena ludstilo, gajnis plejparton de la ĉampionejoj en pluraj ĉampionejoj konkursoj kaj tiel fariĝis fortuloj inter la mondaj tablotenisistoj. En la 26-a Monda Tablotenisista Ĉampioneja Konkurso en 1961, la ĉinaj tablotenisistoj, per sia originala ludmaniero de ĉetabla rapida atako, venkis la japanajn, kiuj lertis en lopa drivado, kaj tiel gajnis la superecon. En la 70-aj jaroj la eŭropaj tablotenisistoj asimilis la superaĵojn de la japanaj teamoj en lopa drivado kaj tiujn de la ĉinaj teamoj en rapida atakado kaj kombinis ilin kun la siaj, formante novan

ludmanieron kaj farante la pilkon turniĝanta pli forte kaj pli rapide. Kaj ilia potenco plene elmontriĝis en tiu ĉi konkurso. Tial Li Furong, vicestro de la Ĉina Tablotenisista Delegacio kaj ĝia ĉeftrejnisto, opiniis, ke la ĉi-foja konkuro estis senprecedence forta kun la plej alta nivelo. Preskaŭ samaj la nivelo de la ĉinaj teamoj kaj tiu de la aliaj fortaj teamoj.

Venis al Novi Sad reprezentantoj el 86 landoj kaj regionoj kaj pli ol 500 getablotenisistoj por fortigi amikajn interrilatojn kaj partopreni la konkurson. La hungara kaj japana teamoj gajnis respektive la duan kaj trian lokojn de la vira teama konkurso; la sudkorea teamo kaj la teamo de la Korea Demokratia Popola Respubliko gajnis respektive la duan kaj trian lokojn de la virina teama konkurso.



La Ĉina Vira Teamo venkis la hungaran per 5:2 kaj gajnis la ĉampionecon de la konkurso.



LA PROGRESO DE ĈINA SPORTO

Lastatempe Rong Gaotang, vices-tro de la Ĉina Komisiono de Fizika Kulturo kaj Sportoj, diris en gazetara konferenco de ĉinaj kaj alilandaj ĵurnalistoj, ke post la fondiĝo de la nova Ĉinio estis starigitaj en diversaj lokoj pli ol 2,600 geknabaj postlecionaj sportaj lernejoj, en kiuj sin trejnas pli ol 240,000 amatoroj, kaj establita 13 sportaj institutoj en Beijing (Pekino), Shanghai (Ŝanhajo) kaj aliaj urboj, en kiuj estas elkulturitaj pli ol 29,000 studentoj. Krome, la ŝtato konstruigis ankaŭ pli ol 3,800 stadionojn, sporthalojn kaj naĝejojn.

Laŭ statistiko, en 1977—1980 ĉinaj gesportistoj 33-foje rompis mondajn rekordojn de halterlevo, pafado, arkpafo kaj aliaj 17 sportobranĉoj kaj gajnis 22 mondĉampionecojn de tablotenis, volano, gimnastiko kaj halterlevo.

Rong Gaotang diris, ke Ĉinio nun atingis la mondan avangardan nivelon nur en parto da sportobranĉoj kaj estas ankoraŭ malproksima de la monda nivelo en la granda

parto, kaj ke ili bone faros la preparan laboron por partopreni en la 9-a Azia Sporta Kunveno en 1982 kaj la 23-aj Olimpikoj en 1984.

NOVAJ SUKCESOJ DE ĈINAJ GEGIMNASTOJ

En la tria tagdeko de aprilo ĉinaj gegimnastoj akiris bonajn sukcesojn en la gimnastikaj turniroj okazintaj en Rumanio, Japanio kaj Tunizio. En la 24-a Internacia Gimnastika Konkurso, okazinta en Rumanio, kun partopreno de 13 landoj, ĉinaj gimnastoj Fu Luming kaj Kuang Xianyao gajnis la virajn ĉiurondajn ĉampionecon kaj subĉampionecon.

En la 12-a Japana Internacia Gimnastika Turniro de la Pokalo de la Tokia Disaŭdiga Kompanio, ĉinaj gegimnastoj Ma Yanhong, Wen Jia kaj Huang Yubin gajnis kvar orajn, du arĝentajn kaj tri kuprajn medalojn en 10 viraj kaj virinaj individuaj konkursoj.

En la 4-a Tuniza Internacia Gimnastika Turniro ĉina gimnasto Chen Jun kaj ĉinaj gimnastinoj Zhuo Jingjing kaj Zhu Jieya gajnis 10 ĉampionecojn kaj 11 orajn medalojn en la konkursoj de 12 sportobranĉoj. Chen Jun kaj Zhuo Jingjing estis titolitaj kiel plej bonaj gegimnastoj de tiu turniro.

SPORTA KUNVENO DE ĈINAJ BLINDULOJ KAJ SURDMUTULOJ

En la dua tagdeko de aprilo la Beijing-a Asocio de Blinduloj kaj Surdmutuloj okazigis sportan kunvenon de 1981 kun partopreno de 746 blinduloj kaj surdmutuloj el 68 fabrikoj kaj lernejoj. Inter ili la plej maljuna estis 65-jarulo kaj la plej juna — 8-jarulo. Ili ĉiuj estis plej elstaraj en la elektaj sportaj konkursoj faritaj ĉi-jare en diversaj fabrikoj kaj lernejoj.

La sporta kunveno komenciĝis de la ĉina ŝakludo. Krome, estis ankaŭ atletika, korbopilka, tablotenisa kaj aliaj konkursoj.

GRANDA TEGMENTITA NAĜEJO KONSTRUITA EN ĈINIO

La plej granda tegmentita naĝejo de Ĉinio estis finkonstruita en la urbo Chengdu (Ĉengdu) kaj transdonita al uzado en la 1-a de aprilo. La naĝejo kun areo de 12,132 kvadrataj metroj havas naĝbasenon kun ok strioj kaj plonĝbasenon kun turoj de ses malsamaj altoj, 1,800 fiksajn sidlokojn kaj 1,000 moveblajn seĝojn, kaj ankaŭ elektronikajn tempo- kaj poento-registilojn kaj instalaĵojn por observado kaj fotado sub akvo.



El Leteroj de Niaj Legantoj

ESP-O PLEJ TAŬGAS . . .

Kvankam mi ĵus revenis el kliniko post operacio de okulo pro katarakto, mi deziras tuj esprimi al vi mian kontenton pri la ĵus ricevita numero 12/1980 de El Popola Ĉinio.

La tre varia enhavo kun multaj interesaj artikoloj, la zorge farita preso, la bone elektitaj fotoj — ĉio faras tre plaĉan impreson. Via revuo bonege informas pri via lando kaj ĝia kulturo kaj pri la aktiva laboro de viaj civitanoj.

Esperanto, kiel neŭtrala interkompreniĝilo, plej bone taŭgas por diskonigo de kulturo, moroj, informoj, ktp. tra la tuta mondo. Se la cetera mondo vidas, ke Ĉinio vastaskale uzas Esperanton, ankaŭ aliaj landoj, ŝtatoj kaj popoloj sekvos

kaj liberigos sin de la lingva imperiismo de iuj grandaj potencoj.

de **F. W. Poppeck** (FRG)

EPC MULTE PROGRESIS

El Popola Ĉinio multe pliboniĝis lastatempe. Ĝi jam ne estas tro "politikeca," ideologia kiel antaŭe. Ĝi ankaŭ multe progresis per pliiĝo de pri-esperantaj temoj, ne nur el Ĉinio, sed ankaŭ el la tuta mondo.

de **A. Mehtonen** (Finnlando)

RAPORTO REKTA, SENMENTSOGA KAJ VARIA

Via revuo estas io speciala en la esperanta mondo, kiu ne nur estas tre belege eldonita, sed samtempe plenriĉa je ĉiuj sciigoj el via tre interesa kaj valora lando. Via raporto estas rekta, senmentsoga kaj varia. Tio estas ĝia vera valoro.

de **Jakubiec Boleslaw**
(Pollando)

BONVOLA KUNEKZISTO KAJ KUNLABORO

Estante ĉiam leganto de via gazeto mi venas per mia letero gratuli vin pro la nova prezento de la gazeto en kiu nun vi publikigas, krom artikolojn pri progresoj en via lando, ankaŭ novaĵojn pri Esperanto kaj interesajn artikolojn pri ĝi, kaj ĝia movado enlande kaj eskterlande. Mi vidas en via lando unu novan fortiĝantan fokuson de Esperanto kiu povas kontribui al la atingo de la fina celo.

Mi devas ankaŭ gratuli vin pro la nova vojo kiun eksekvis via lando kun la multmiljara civilizo, kiu, kvankam komunista, amikiĝis kun la ne-komunista mondo en spirito de bonvola kunekzisto kaj kunlaboro profite de ambaŭ popoloj.

de **S. Sakellaropoulos**
(Grekio)

ĈIUJ SUBTENU LA INICIATON

Kun granda intereso kaj ĝojo mi legis en via ŝatata revuo (EPC 81/1)

la artikolon de s-ro Tibor Sekelj, ke la Jugoslavia Esperanta Ligo pere de sia registaro esperas proponi al la Movado de Nealiancitaj Landoj (MNL) la alprenon de Esperanto kiel oficiala lingvo de la movado. Speciala estas la fakto, ke tiu ĉi propono venas el lando kiu sukcese pioniris la Nealiancitan Movadon kaj estas ĉiam tre fidela kaj aktiva membro en ĝi. Espereble ĉiuj klopodoj antaŭ MNL povos doni definitivajn rezultojn ol similaj agadoj faritaj aŭ farotaj antaŭ UNO, Organizo de Amerikaj Ŝtatoj aŭ Eŭropa Ekonomia Konsilantaro, ĉar neniu el la popoloj apartenantaj al MNL devas timi pri perdo de siaj propraj lingvaj rajtoj aŭ privilegioj pro adoptiĝo de la Lingvo Internacia kiel dua lingvo por ĉiuj kaj kiel komuna lingvo por internacia uzo. Kune ni ĉiuj subtenu ĉi tiun iniciaton laŭpove kun espero je sukceso.

de **D. B. Jesudason**
(Srilanko)

TIEL MI MULTE KOMPRENAS

Mi tre ŝatas la rublikojn "Vidindaj Lokoj" kaj "Tra la Mondo", kaj aliajn artikolojn pri la naturo (floroj kaj pejzaĝoj), la historio kaj la kulturo (pentraĵoj kaj skulptaĵoj) de Ĉinio. Tiel mi multe lernas kaj komprenas la vivon en via bela lando.

de **De Craene Caestecker**
(Belgio)

ARTIKOLSERION PRI INSTRUADO DE ESP-O

Estas tre ĝojige legi en la paĝoj de via revuo, kaj ankaŭ de aliaj Esperanto-eldonaĵoj, pri la rapida progreso de la Esperanto-movado en Ĉinio, kaj speciale pri la denova enkonduko de Esperanto-kursoj en universitatojn kaj altlernejojn. De efika instruado dependas la tuta progreso de nia afero, kiel konstatas ne nur instruistoj, sed ankaŭ eldonistoj kaj aliaj, kiuj aktive laboras por Esperanto. Efikigo de la

instruado de Esperanto tra la mondo, do, meritas gravan lokon en la laborplanoj de kiu ajn Esperanto-instanco. Esplorojn necesajn al tiu efikigo grave helpus pli vasta disvastigo de informoj pri instrumentadoj kaj materialoj uzataj en apartaj instru-situacioj. La rapida progreso de Esperanto en via lando devas esti bazita sur efika instruado: tial mi faras la proponon, ke vi aperigu artikolserion pri tiu instruado, verkitan de la koncernaj kursgvidantoj. Tiajn artikolojn certe legus kun forta intereso multaj viaj legantoj.

de **Audrey C. E. Childs-Mee**
(Nederlando)

POEZIAN ANGULON

Ŝajnas al mi, ke via revuo estus pli kompleta kaj agrabla, se ĝi havus malgrandan angulon rezervatan al la poezio, pli bone se ĝi elvenus el esperantistoj de diversaj landoj.

de **Maria Coraiola**
(Italio)

ĈINAJN PROVERBOJN SURPAĜIGU

Efektive, la proverboj estas ĉiam interesaj por studi. Ili povas esprimi laŭvice, jen banalajojn, jen inteligentplenajn konsilojn. D-ro Zamenhof tradukis multajn proverbojn sed la plejparto devenis el eŭropaj popoloj. En la Zamenhofa proverbaro ne troviĝas multaj proverboj ĉinaj, kiuj estas tamen multnombraj kaj signifoplenaj.

La antikva kaj nova ĉina saĝeco estas ja studenda kaj studinda, kaj sendube diverslandaj esperantistoj ŝatus konatiĝi kun ĝi perproverbe. Eble ĉiumonate, vi povus surpaĝigi en EPC kvin (aŭ pli multe) tipajn ĉinajn proverbojn kies devenojn vi povus mencii.

de **Heriau Maurice** (Francio)

Mi ŝatus pli ofte vidi rakontojn aŭ gajhumorajn aŭ gravajn.

de **D. P. Mason** (Aŭstralio)



* Geknaboj kaj gejunuloj, miaj gelernantoj de Esperanto, volonte ricevos kuraĝigajn salutojn. Kelkaj ankoraŭ bezonas junajn gekorespondantojn. S-ino Anna Alamo-Sandgren, Box 7, S-694 02, Hallsberg 2, Svedujo.

* Rafael Maria Fernandrz de Liencrez, 18-j. amanto de poezio, dez. kor., Oscar Carballo 16, Sevilla-España.

* Madame Ladril Marcelle, Rue, Ernest de Baviere, 16, 4020, Liege Belgio, dez. kolekti p.m., p.k. ĉiuteme kaj ĉiulande.

* Filatela ekspozicio de Esperantaj poŝtmarkoj, poŝtstampoj kaj poŝt-tutaĵoj el la tuta mondo estos aranĝota la 26-an de sept. 1981. Bonvolu subteni nian novan esperantan sektion de Filatela Klubo en Trebisov per sendado de simila materialo, kiu ankaŭ estos ekspoziciota. Ĉiuj subtenantaj salutkartoj — leteroj estos responditaj pere de festeldonaj poŝtkartoj kun speciala poŝtstampo kaj ricevos katalogon kaj informojn de peranto de la ekspozicio: Fridrich Zold, CS-07632 Borsa c. 368, Ĉeĥoslovakio.

* Zygos Wilhelm, 26-j., ul. Nowotki 1, 45-501 Opae, Pollando, dez. kor. kun gesamaĝuloj el Ĉinio, kiu interesiĝas pri sporto, muziko, turistiko kaj filatelo.

* 6-jaraĝa knabineto en lerneja 2-a klaso dez. leteramikojn en multaj landoj. Intereso estas violono, baletto, belaj vestoj, biografio, biciklado, scienco. Sara Su Jones, 452 Aldine Apt. 501, Chicago, IL. 60657, Usono (U.S.A.) (kun sia foto)

* 35-jara polino dez. kor. kun gesamideoj t.m. kaj ĉ.t. Interŝ. p.k., p.m., kalendarojn, gramofonajn diskojn, E-librojn kaj aliajn. Tre volonte mi kun geamikoj el tre interesaj kaj belaj ekzotikaj landoj de Azio, Maria Krawulska, str. Zeromskiego 13, 63-400, Ostrow Wlkp. Pollando-Polska.

* Bicskey Emilia-Mariana, Adolescente Nr. 1, bl. D 13/3, Sc. A, Ap. 11, Timisoara 1900 Rumanio, dez. kor.

* 29-jaraĝa teknikisto dez. kor. kun ĉinaj geesperantistoj pri ĉiuj temoj, Stanislaw Klim, ul. Kucocinskiego 11/1, 57-200 Zabkowitz SL, Pollando.

* Pall Jmre, 17-jara gimnaziano, Baktai 171, 4206 Foseni, Harghita, R.S. Rumanio, kun samaĝaj geknaboj el ĉiuj landoj, filatelisto en Ĉinio.

* Paul Koeck, 16-jara studento, kun tutmondaj, samaĝaj geamikoj pri religio, ĉiutaga vivo, muziko, kulturo k.t.p., Amerikalei 39, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Sara Su Jones



Tang

KARAJ legantoj, ĉu vi iam vidis tian “konstruejon”, kie iras konstruado ne de kelke da etaĝdomoj, unu aŭ du stratoj aŭ kvartalo, sed grandskala konstruado de tuta urbo kun pli ol miliono da loĝantoj, minejoj kaj fabrikoj de pezaj kaj malpezaj industrioj, vendejoj, hospitaloj, lernejoj, sciencaj institutoj kaj aliaj servoj necesaj por ĉiutaga vivo?

Lastatempe mi vizitis tiun bolantan konstruejon — la urbon Tangshan (Tangŝan) rekonstruatan sur la ruino kaŭzita de la tertremo en 1976. La urbo situas nordoriente de Beijing je 250 km. Antaŭ la tertremo ĝi havis 1.06 milionojn da loĝantoj kaj famiĝis kiel produktejo de karbo kaj porcelanaĵoj. En julio de 1976 okazis al ĝi granda tertremo de 7.8 gradoj, kiu en palpebruma daŭro ruinigis la tutan urbon, 130,000 homoj mortis kaj 80,000 grave vundiĝis.

En la sekvinta jaro post la tertremo mi vizitis tiun urbon kaj konigis al la legantoj pri la stato de la katastrofo kaj la postvivantoj en la n-roj 2 kaj 3 de nia gazeto, 1978. De tiam forpasis pli ol kvar jaroj. Kiel stas nun la urbo kaj kiel vivas kaj laboras la loĝantoj?

EN LA KONSTRUEJO

Lastfoje en mia vizito al tiu urbo mi intervjuis en malalta kabano laboriston Shi Yufa, kies

Shan Hodiaŭ

de NIA RAPORTISTO

edzino mortis pro la tertremo. Kiam li renkontis malfacilojn en vartado de sia bebo, multaj etendis al li helpajn manojn. Post 3.5 jaroj, mi refoje lin vizitis, la konata dometo jam ne videblis, anstataŭ ĝi estis metata fundamento de nova etaĝdomo.

Helpate de aliaj, mi trovis lian novan loĝejon. Ni ambaŭ tre ĝojis pro la refoja intervidiĝo. Li diris al mi ke li denove edziĝis en 1978. Post geedziĝo li transloĝiĝis en tiun belan 5-etaĝan domon. La plankareo de lia nuna apartamento estas 40 kvadrataj metroj, t.e. duoble pli ol tiu antaŭ la tertremo. Ĝi banata en sunlumo kaj freŝa aero, konsistas el du dormejoj, kuirejo, necesejo kaj balkono.

Tiaj loĝdomoj kaj grandaj publikaj konstruaĵoj videblas ĉie de la fervoja stacio ĝis la hotelo kie mi pasloĝis. Precipe sur tereno de pli ol 20 kvadrataj kilometroj en la nordokcidenta antaŭurbo ĉie estas novaj loĝdomoj. Oni diris al mi ke 50,000 familioj jam transloĝiĝis en tiajn domojn kaj aliaj 40,000 familioj estas transloĝiĝantaj. Tio signifas ke ankoraŭ duono da loĝantoj ne havas novajn loĝejojn. Nun sur la ruino de la malnova urbo kaj inter la novaj domoj ankoraŭ kunpremiĝas portempaj loĝdomoj.

Tangshan estas konstruata laŭ la projekto kune ellaborita de


pli ol 2,300 specialistoj kaj inĝenieraj laborantoj de la tuta lando. La totala plankareo de la konstruaĵoj estas 14,130,000 kvadrataj metroj. La tuta urbo konsistas el tri partoj malnova, orient-mineja kaj nove konstruita. La malnova parto situas en la norda parto de la originala urbo. Ĝi kiel la urbo-centro baldaŭ havos domegon por la urba registaro, magazeno, bibliotekon, teatron, kinejon, hospitalon kaj fervojan stacion. La orientmineja parto ĉefe inkluzivas Kailuan-karbonejon. Ĝi estas konstruata laŭ la dislokiĝo de la karbonejoj. La nove konstruita parto situas en la gubernia urbo Fengrun, malproksima antaŭurbo de Tangshan, kie kon-

centriĝas tekstila, meĥanika kaj elektronika industrioj. Tien translokiĝos ankaŭ kelkdek fabrikoj en la malnova urbo. La tri partoj kunligitaj per fervojoj kaj ŝoseoj formas triangulon kaj distancas je 25 km unu de la alia.

La grandskala rekonstruado de Tangshan komenciĝis en la lasta duonjaro de 1978. Antaŭ tio oni faris multe da prepara laboro por forigi la rubaĵojn, ellabori projektojn kaj pretigi materialojn. Mi propraokule vidis kiel la laboristoj lokaj kaj alilokaj tagnokte laboras sur la konstruejoj. Nun en la tuta urbo jam finkonstruiĝis domoj kun plankareo de 4.11 milionoj da kvadrataj metroj. Ĉiuj ĉi nove konstruitaj etaĝdomoj povas elteni relative fortan tertremon.

Ĉiu el la finkonstruitaj loĝkvartaloj konsistas el 150-200 etaĝdomoj kun ĉ. 30,000-50,000 loĝantoj. En ĉiu loĝkvartalo troviĝas magazeno, bufedejoj, barbirejoj, deponejo, geknaba domo k.a. Nun inter la domoj kaj ambaŭflanke de la trotuaroj estas plantitaj herboj, floroj kaj

Inĝenieroj kaj projektistoj interkonsiliĝas pri rekonstruo de Tangshan.



arboj. Krome, kelkaj nove konstruitaj ebenaj kaj larĝaj stratoj kun altaj domoj kaj arboj ambaŭflanke trairas la malnovan kvartalon de sude norden kaj aspektas impone.

MENDILO DE PORCELANAĴOJ

Tangshan estas unu el la gravaj industriaj urboj en la norda Ĉinio. Tie troviĝas la fame konata Kailuan-karbominejo, porcelana industrio kun longa historio kaj industrioj elektra, ferstala kaj tekstila.

La tertremo ne nur serioze detruis la fabriksdomojn, ŝaktojn kaj aliajn instalaĵojn, sed ankaŭ kaŭzis morton de granda nombro da loĝantoj. La mortintoj nur de Kailuan-karbominejo kaj la Ceramika Kompanio jam konsistigis dekonon de la totala nombro de la laboristoj de la tuta urbo. Tial por rekomenci la produktadon oni devas fari multegajn laborojn.

Respondeculo de la industria departemento de la urbo diris al mi, ke dank' al ĉiamaniera klopodo de la laboristoj multaj fabrikoj kaj minejoj rekomencis sian produktadon post iom pli ol unu jaro post la tertremo. En 1980 la totala industria produkt valoro de la tuta urbo jam superis tiun antaŭ la tertremo kaj atingis 2.6 miliardojn da juanoj. Li diris, ke en la pasinta jaro Kailuan-karbominejo produktis 19.28 milionojn da tunoj da kruda karbo kaj 5.875 milionojn da tunoj da akvolavita karbo, per kio ili superplenumis la ŝtatan planon kaj la taskon eksportan.

Limigite de la ekipaĵoj, antaŭ la tertremo Tangshan havis termoelektron kun kapacito de 350,000 kilovattoj. Nun ĝi ha-

En la infanvar-tejo de Tangshan-karbominejo



vas du termoelektron kun kapacito de 1,050,000 kilovattoj, kaj pro tio ĝi ludas gravan rolon en la elektra reto de Beijing, Tianjin kaj Tangshan.

La lokanoj tre ŝatas paroli al la vizitantoj pri la produktado de porcelanaĵoj, kaj ili ankaŭ parolis al mi pri la mendilo sendita el Usono antaŭ nelonge. La afero okazis tiel: en 1980 komercisto de la usona kompanio N.P.C. mendis 10,000 kompletojn da bonkvalitaj manĝilaroj (ĉiu kompleto konsistas el 45 pecoj). Ricevinte la menditajn varojn, la kompanio sendis telegramon al la departemento de ekstera komerco de Hebeiprovinco, en kiu ĝi laŭdas, ke la varoj estas bonkvalitaj kaj havas grandan debiton en Usono, kaj ĝi plie mendis 270,000 kompletojn.

Oni donis grandan atenton al tio, ĉar ĝi spegulas la restarigon kaj disvolviĝon de la porcelana industrio de la urbo.

La Tangshan-a porcelanaĵo, kiu havas historion de pli ol 500 jaroj, estas fama pro sia delikateco, solideco, glazur-brileco kaj bela formo, kaj havas grandan debiton en Ĉinio kaj Sudorienta Azio. La tertremo ruinigis la fabriksdomojn, bakujojn kaj ĉiujn ĝiajn stokojn, kaj forrabis la vivon de multaj projektistoj kaj teknikistoj de tiu fako. Estis dubinde ĉu ĝi povas denove produkti. Nun per fakto la laboristoj kaj teknikistoj donis sian respondon. Oni ne nur rekomencis la produktadon de ordinarnaj porcelanaĵoj, sed ankaŭ grandan debiton havas iuj novaj produktaĵoj projektitaj de junaj projektistoj, ekzemple la porcelana plato kun desegnaĵo "Kusanta Tigro" kreita de juna laboristo Dong Dafang de la Dua Porcelanaĵa Fabriko kaj eŭropa manĝilaro projektita de Zhao Youti de la Kvina Porcelanaĵa Fabriko ĉiuj havas sian originan stilon kaj estas laŭdataj de alilandaj komercistoj.

Krome, porcelanaĵoj de Tangshan kun besta cindro kiel la ĉefa materialo, altklasaj porcelanaĵoj, kemiaj porcelanaĵoj kaj aliaj havas grandan debiton en pli ol 80 landoj kaj regionoj. Lastjare la produktovalorado de ĝia porcelana industrio atingis 88.23 milionojn da juanoj kaj ĝia produktivo atingis la plej altan nivelon antaŭ la tertremo.

Kompreneble, estas ankoraŭ multaj problemoj solvendaj, kiaj media polucio kaj manko de teknikistoj en iuj fabrikoj kaj minejoj.

DU FAMILIOJ

La Tangshan-a popolo estas laŭdata de en- kaj eksterlandaj vizitantoj pro sia firmeco, aplombo, optimismo kaj memfido en la batalo kontraŭ la katastrofo kaj en la rekonstruado de sia hejmloko. Ankaŭ mi estis kortuŝita de tio. Mi intervjuis laboristojn, komizojn, teknikistojn kaj oficistojn. Iuj el ili jam transloĝiĝis en novajn

etaĝdomojn kaj aliaj daŭre loĝas en la simplaj domoj.

La familio de Liu Cuilan kun kvin membroj ankoraŭ loĝas en simpla domo de la urbocentro. Ŝiaj du filoj kaj unu filino jam laboris. Kiam mi ŝin vizitis, ŝi kaj ŝia edzo kun rideto akceptis min. La gemastroj estas afablaj kaj parolemaj. Iliaj bone meblitaj ĉambroj malakordas kun la modesta aspekto de la domo. Liu diris ke pro mallarĝeco de la loĝejo, ŝi ankoraŭ ne volas aĉeti televidilon. Eĉ sub tablo metiĝas potfloroj kaj pendas sur trabo birdkaĝo kun paro da papagoj kantan-taj gaje.


“Kiam vi transloĝiĝos en novan loĝejon?” demandis mi. Ŝi respondis ke estas malfacile certigi pri tio, ŝi, kiel kadro de la loĝkvartala administrejo, ne volas transloĝiĝi pli frue ol la aliaj loĝantoj. Ŝi opiniis ke la konstruado de loĝdomoj iras ne tiel rapide, tamen la loĝantoj estas

kontentaj pri la stabila vivo kaj ilia laborentuziasmo estas alta. Ŝi parolis pri sia propra familio, ke antaŭ la tertremo nur ŝia edzo lukris, sed nun ĉiuj ŝiaj gefiloj laboras, tial la enspezo de la familio multe pligrandiĝis. Ŝi emocie diris, ke ŝi travivis plurajn naturajn katastrofojn, kaj ĉiufoje la nombro de la mortintoj pro postkatastrofaj epidemioj kaj malsato superis tiun pro la katastrofo. Sed post tiufoja tertremo estis nek epidemio nek malsato. Ne estas strange ke iuj opinias tion mirakla.


Tion parolante, ŝi vole nevole rememoris pri sia mortinta pli-aĝa filino. Ŝi diris, ke ŝi estis aminda knabino, kaj se ŝi vivus, ankaŭ ŝi laborus. Tamen ŝi ne montris sin tre ĉagrena, ĉar ŝi sciis ke la tertremo kaŭzis al ĉiuj familioj perdojn, kaj iuj familioj eĉ tute pereis. Kompare kun ili la malfeliĉo de ŝia familio ne estas tiel granda.

Forlasinte ŝian domon, mi veturis al la nove konstruita loĝkvartalo sur Hebei-strato. Ankaŭ tie la loĝejo estas paroltemo plej interesa por la loĝantoj. Ili ofte komparas la novajn loĝejojn kun la malnovaj, laŭdante la komfortecon de la unuaj. Kaj iuj tre zorgas pri siaj amikoj, parencoj kaj malnovaj najbaroj kiuj loĝas ankoraŭ en portempaj domoj.

Tie vivas 6-membra familio: mastrino Yan Suzhen, ŝiaj edzo, filo, bofilino kaj nepoj, ili havas du apartamentojn kun plankareo de ĉ. 60 kvadrataj metroj. Yan diris al mi, ke la loĝejo estas duoble pli larĝa ol la malnova. Nun ne plu videblas la fenomeno ke tri generacioj kune vivas en unu ĉambro. Ŝia familio havas pli multajn kaj pli bonajn



Unu el la legomvendejoj de Tangshan



*En la Tangshan-a
Ŝtala Kompanio*

meblojn, kaj krome ili aĉetis novan televidilon.

La laboranto de la loĝkvar-tala administrejo akompanis min por viziti la nove konstruitajn domojn. Plejparto de la teretaĝaj domoj servas kiel ĉiovendejoj, grenvendejoj, manĝejoj, flor-butikoj, mezgradaj kaj elementaj lernejoj.

Ĉar multaj familioj loĝantaj en provizoraj domoj de la malnovaj urboterenoj ne povas rapide translokiĝi, ĉiuj novaj domaroj devas esti konstruitaj ĉirkaŭ la originala urbotereno, kio ja alportis al la loĝantoj maloportunecon en trafiko. Ĉiutage la filo kaj bofilino de Yan devas veturi pli longan vojon al la laborejoj en la centra urbo. Ili deziras ke tiu malfacilo baldaŭ solviĝu per interŝanĝo de laboroj aŭ plibonigo de la trafiko.

DOMO POR PARALIZULOJ

Ni ofte vidis gambomankajn kriplulojn aŭ paralizulojn kiuj veturigante triciklojn helpate de

nekonatoj transpasas stratojn, kaj kinejoj malfermas specialan pordon por ke paralizulaj tricikloj povu en- kaj eliri.

La katastrofo estigis 1,818 kriplulojn kaj paralizulojn en tiu urbo. Ili estas vunditaj je la centraj nervoj kaj paralizigis la malsupraj membroj. Iuj el ili eĉ perdis kuraĝon por vivi, pro la neeltenebla doloro kaj troa ĝeno al siaj familianoj, tamen finfine ili venkis pesimismen zorgate de la socio.

En la Sanatorio de la Tangjiazhuang-a Karbominejo mi trovis, ke oni aranĝis kvietan kaj komfortan medion por la malsanuloj. En la ĉambroj por paralizuloj mi vidis, ke iuj el ili ludas ŝakon, aliaj estas en trikado, triaj aŭskultas muzikon ĉe magnetofono kaj kvaraj skribas ĉe tablo.

Ĝi estas bone ekipita sanatorio de la minejo. Sur la malsanulaj litoj sterniĝas plastspongaj kusenoj. Por faciligi ilian movadon estas pretigitaj rulseĝoj. Kaj krome en ĉiu ĉambro troviĝas televidilo.

En la malsanulinaj ĉambroj de la sanatorio de la Kaiping-a Popola Komunumo en la antaŭurbo de Tangshan, mi vidis floran mondon. Sur la fenestrobretoj metiĝas potfloroj, kiuj elspiras agrablan aromon. Ĉie en la ĉambroj pendas diverskoloraj paperfloroj faritaj de la malsanulinoj. Malsanulino Liu Suying diris al mi, ke senfare sidi tuttage en la ĉambro estis enuige, sed nun ili faras artajn florojn, kio ne nur vigligis ilian vivon, sed ankaŭ pliiĝis iliajn enspezojn. Per tio

ŝi enspezas 20-30 juanojn ĉiunonate.


En la urbo Tangshan troviĝas 23 tiaj sanatorioj. Oni nomas ilin "domoj por paralizuloj", kies laborantoj estas samnombraj kiel la malsanuloj. La elspezoj de la senlaboraj urbanoj por vivo kaj kuracado estas pagitaj de la ŝtato kaj tiuj de la laboristoj kaj oficistoj estas pagitaj de iliaj laborunuoj kaj tiuj de komunumanoj estas trione pagitaj de ilia familio kaj du-trione de ilia produkta brigado. Pro nesufiĉeco de la malsanulaj litoj nun la sanatorioj akceptas nur pacientojn ne havantajn flegantojn hejme. Tiujn malsanulojn kiuj havas fleganton hejme vizitas la kuracistoj je regula tempo. Ili ĝuas la saman rajton en la vivo kaj kuracado kiel tiuj en la sanatorioj.

La malsanuloj plejparte estas 20-40-jaraj. Multaj el ili jam geedziĝis antaŭ la tertremo. Inter miaj vizititoj neniu estas forlasita de sia edzo aŭ edzino post sia kripliĝo. Kaj kelkaj paroj da geamantoj antaŭ la tertremo geedziĝis eĉ post kiam la amat(in)o kripliĝis.

Efektive, ne ĉiuj paralizuloj ĉiam perdis kapablon stariĝi kaj moviĝi. Instruisto Song Qingfeng, kiun mi vizitis, ricevis operacion de rekunigo de sia rompita spino, tamen paralizigis liaj malsupraj membroj. Dank' al sia persista ekzercado li finfine sukcesis mem stariĝi kaj nun eĉ povas bicikli al la lernejo. Oni diris al mi ke en la urbo 39 pacientoj kiel instruisto Song resaniĝis kaj revenis al laborpostenoj aŭ povas fari malpezan laboron.

Tangshan en rekonstruado

En nova loĝejo



Loĝdomoj en konstruado





Ciovendejo ĉe la strato Liberiĝo



La Tangshan-a Lokomotiva kaj Vagona Fabriko post la tertremo en 1976



Ĵus konstruita loĝkvartalo




Strato de Tangshan



Nova elementa lernejo




Laborejo de la Tangshan-a Dua Ceramikaj-fabriko



La Nanjing-a Unia Teologia Seminario remalfermita

La nomita seminario fondiĝis en 1952 kaj fermiĝis en la kultura revolucio. Ĝi remalfermiĝis en Nanjing en la 28-a de februaro 1981 kaj varbis 47 lernantojn el diversaj partoj de la lando, kiuj havas klarecon de supera mezlernejo aŭ pli alte. Post diplomiĝo ili laboros por kristanismo.

La lernotempo estas kvar jaroj. La nuna prezidanto estas episkopo Ding Guangxun kaj vicprezidanto — pastro Chen Zemin.



La Nanjing-a Unia Teologia Seminario



En la leciono de Biblio



La diservo markas la remalfermon de la seminario.

Por savi knabinon

ATAŬ duonjaro, en Beijing (Pekino) juna laboristo Gao Yuntao kaj emerita maljuna laboristo Tian Jiyue oferis sian vivon por savi knabineton falintan en akvon. Ilia faro montras la komunan noblan kvaliton de du generacioj de ĉinaj laboristoj.

KNABINETO AILI FALIS EN AKVON

En la 1-a de la frosta februaro ĉijare, kvar tagojn antaŭ nia tradicia Printempa Festo, Aili, 8-jara filino de laboristino Cheng Yulan de la maŝin-riparejo Xiangyang, senatente falis en akvon dum unuopa ludado ĉe bordo de rivero. Ĉar ŝi portis sur si dikajn vatitajn vestojn, tial ŝi nur duone dronis en akvo kaj flosis laŭ fluo. Vidinte maljunulon sur fervoja ponto, Aili laŭte kriis plorante: "Avo, helpo!" "Avo, helpo!"

Aŭdinte la krion, la maljuna deĵoranta fervojisto Wang Youxian tuj faris serĉon en direkto de ŝia voĉo kaj fine trovis knabineton flosanta sur la akvosurfaco. Timante ke ŝi subakviĝos, li laŭte kriis al ŝi: "Knabino, sternu viajn brakojn kaj ne konsterniĝu, mi tuj savos vin."

Wang Youxian hastis al sia deĵorejo kaj prenis longan dikan ŝnuron. Ĵetante la ŝnuron al la

knabino, li tutgorĝe alarmis: "He, knabineto falis en akvon, helpo al ŝi!" Unu fino de la ŝnuro venis de sur la ponto ĝis ĉirkaŭ la knabineto, tamen ŝi ne sukcesis kapti ĝin. Iom post iom tramalsekiĝis ŝiaj vestoj kaj sinkis ŝia korpo. La juna vivo estis en danĝero. . .

POR KE ŜI VIVU

Aŭdinte la krion, iu biciklanta junulo rapidis al la riverbordo. Li tuj demetis sian surtuton, saltis en la akvon kaj naĝis al ŝi, unu metron, du metrojn, dek metrojn, dudek metrojn. . . Se tio okazus en somero, ne estus malfacile por li, tamen nun en la frosta vintro la glacia riverak-

vo pikis lin ĝis la ostoj kiel pingloj. Fine li sukcese proksimiĝis al Aili kaj elakvigis la knabineton per ambaŭ siaj manoj kaj pene kunportis ŝin al la bordo. Li estis debila, nun li preskaŭ konsumiĝis, liaj brakoj jam senfortiĝis. Kiam li lastfoje elakvigis la knabineton, li ne plu povis teni ŝin sur la piedoj, li estis glutita de la glacia rivero.

Lia spiro jam ĉesis, kiam oni elprenis lin el la akvo. Tamen liaj manoj ankoraŭ konservis la pozon teni ion supren. Oni trovis laboran karton en lia poŝo kaj sciigis ke li nomiĝas Gao Yuntao, 31-jara laboristo de la Ĉefurba Maŝina Fabriko. Rigardante tiun junulon, ĉiuj larmis nedeteneble.

"MI MORTOS INDAN MORTON"

En la momento, kiam Gao Yuntao estis sinkanta, Tian Jiyue, 67-jara emerita laboristo de la Beijing-a Ledaĵfabriko, aŭdis la krion, rapidis tien kaj senhezite saltis en la akvon malgraŭ siaj grandaĝeco kaj debi-



Aili

leco. Li naĝis al la knabineto per sia tuta forto. Kiam li atingis la knabineton, la lasta tuj brakumis lian kolon. Post ne-longa naĝado li perdis la forton por daŭre naĝi. Ili baraktis en la akvo. . . Tempo ja signifas vivon. Tiam pluraj homoj rapidis tien kaj saltis en la akvon. Fine ili elakvigis la knabineton kaj la maljunulon.

Aili estis savita, tamen la avo svenanta estis sendita en hospitalon. Dank' al helpo de kuracistoj la maljunulo iom rekonsciigis. Ĝuste tiam la fabrikaj gvidantoj kaj la gepatroj de Aili venis viziti lin. Li malfacile diris: "Mi. . . ne gravas, kiel estas la knabineto?"

Ĉirkaŭ la 10-a nokte la estimata maljunulo, kiu diligente laboris en ledaĵ-fabriko 20 jarojn, forlasis nian mondon malgraŭ kuracado. Antaŭ sia morto li diris: "Kiel maljunulo mi mortos indan morton, se la knabineto estos savita!"

RECIPROKA ZORGADO EN MALFELIĈO

Disvastiĝis la informo pri la morto de la du laboristoj. Oni malĝojis pro perdo de tiaj noblaj homoj kiel Tian Jiyue kaj Gao Yuntao. Kian ĉagrenon ilia morto alportos al iliaj familianoj en la Printempa Festo?

*Vizito al la edzino de
Tian Jiyue kaj liaj parencoj*



Kiel la familioj de la mortintoj kaj la gepatroj de la savita knabineto traktos tiun akcidenton?

Kiam Cheng Yulan aŭdis, ke ŝia filino falis en akvon, ŝi konsterniĝis. Ŝi ŝancelpaŝe hastis al la bordo. Survoje ŝi sciigis de alia, ke ŝia filino estas jam savita kaj la savinta maljunulo estas en danĝero. Tiam ŝi tuj turnis sin al la hospitalo por viziti lin anstataŭ sian filinon.

En la hospitalo ŝi vidis la gefilojn de la maljunulo kaj diris al ili memriproĉe: "Mi estas patrino de la savita knabino, onklo Tian saltis en akvon por savi ja mian knabinon. . . Mi. . ."

Ili konsolis ŝin kaj demandis ŝin pri la knabino. Kiam ili eksciis, ke Cheng Yulan ankoraŭ ne vidis sian filinon, ili urĝis ŝin hejmeniri. Sed Cheng Yulan kapskuis dirante: "Kiel mi povus foriri, antaŭ ol onklo Tian eldanĝerigo?"

La 60-jara onklino Tian falis svene pro neeltenebla perdo de sia edzo. La gepatroj de Aili kaj la gefiloj de onklino Tian restis ĉe ŝi dum la tuta nokto. Rekonsciiginte kaj vidinte, ke la patrino de Aili ankoraŭ staras antaŭ ŝia lito, onklino Tian konsolis ŝin: "Tuj iru hejmen,

zorgu pri via infano kaj gardu vian sanon." Kaj ŝiaj gefiloj aldonis: "Nun ni fariĝis jam samfamilianoj. Ĉu la avo ne savus sian nepinon, kiu falis en akvon?"

Tri tagojn post la okazaĵo, Cheng Yulan hejmenrevenis kune kun Aili post ŝia korpoekzameno en la hospitalo kaj ŝia dua filino diris al ŝi, ke onklino Tian ĵus venis. Cheng Yulan prenis slipon sur la tablo kun jenaj vortoj: "Franjo, mia patrino maltrankviliĝas kaj sendis min viziti vian knabinon. Vi devas multe zorgi pri vi kaj viaj infanoj. — Tian Xiuying." Cheng Yulan firme premis la slipon al la brusto kaj longe ne povis diri eĉ unu vorton.

Cheng Yulan kaj ŝia edzo ne sciis kiel danki ilin kaj partopreni iliajn suferojn. Antaŭvespere de la Printempa Festo, ili aĉetis kukojn, fruktojn kaj ladmanĝojn kaj venis kune kun Aili al ilia hejmo por esprimi novjarajn bondezirojn.

Enirinte la pordon, Aili tuj kriis: "Avino, kara avino!" kaj jetis sin en la sinon de avino Tian. Rigardante Aili, avino Tian kun larmoj diris: "Kia bona knabino! Kiu ne savus ŝin, vidinte ke ŝi falis en akvon?" Ŝi diris al Aili: "Vi devas diligente lerni nun kaj energie labori estonte." Aili kapjesis komprene. Antaŭ ol foriri, Aili respektoplene riverencis antaŭ la portreto de avo Tian.

"YUNTAO ESTAS GLORO DE NIA FAMILIO!"

Granda malfeliĉo trafis ankaŭ la familion de Gao Yuntao. Oni timis ke Za Xiuzhen, 73-jara patrino de Yuntao, suferanta seriozan kormalsanon, ne povos elteni tiel pezan atakon.



Vizito al la patrino de Gao Yuntao

Pro tio la familianoj kaŝis antaŭ ŝi la funebran informon. Pasis du tagoj. La maljunulino ankoraŭ ne vidis sian junan filon kaj senfine demandis, kie li estas. La plej aĝa frato de Yuntao mensogis: "Yuntao enhospitaliĝis pro stomaka hemoragio kaŭzita de troa drinkado antaŭ la Printempa Festo." La evito kaj ĉargreno de la gefiloj sentigis al ŝi dubon. Krome ŝi vidis, ke nemalmultaj kolegoj de Yuntao venis en ŝian hejmon, kaj tiam ŝi ekkomprenis: "Fatalo falis sur la filon." Ŝi dolore ekploris.

Kiam oni diris al ŝi la veron, ŝi deviŝis larmojn kaj diris: "Estas gloro, ke mia filo mortis por savi alian. Mi ĉesos plori, mi ĉesos plori. . ." Je ŝiaj vortoj la ĉeestantoj ne povis sin regi de larmoj. La fratino de Gao Yuntao ekploregis. Vidinte tion, la maljunulino diris: "Vi ĉiuj havas infanojn. Ĉu vi ne esperas ke viaj infanoj estos savitaj, se ili falos en akvon?"

Eksciinte ke la maljunulino jam sciis pri la morto de sia filo, la gepatroj de Aili tuj vizitis ŝin. Preninte ŝiajn manojn, Cheng

Yulan plorsingultis ne povante diri eĉ unu vorton. Karesante la manojn de Cheng Yulan, la maljunulino diris: "Ne ĉagreniĝu, la morto de Yuntao estas inda!" Kaj demandis: "Kiel fartas la knabino?" Cheng Yulan respondis: "Bone. Ni kune vizitos vin post kelkaj tagoj." La maljunulino diris: "Bone! Mi havas kvar nepojn, sed malhavas nepinon!" Cheng Yulan diris: "Ni havas tri filinojn, ekde nun ili ĉiuj estas viaj nepinoj, vi ja estas mia patrino." La maljunulino konsentis: "Bone, bone, ni estas samfamilianoj!"

Gao Yuntao estis avangarda laboristo en la fabriko kaj helpema junulo. Post lia morto, liaj gvidantoj kaj kolegoj rememoris liajn bonfarojn kaj dronis en doloro kaj sopiro. Ili venis al lia hejmo unuj post aliaj por konsoli liajn patrinon kaj edzinon. Lia patrino diris al ili: "Mi ne ĉagreniĝos. Yuntao estas gloro de nia familio. Mi havas tri filojn kaj kvar nepojn. Mi edukos ilin iri lian vojon kaj fariĝi homoj kia li!"

ZHONG HE:

Mistero de "Sovaĝuloj"

OFTE parolata temo jam fariĝis la spuroj de "sovaĝuloj" en la arbara regiono Shennongjia de Hubei (Hubej)-provinco en centra Ĉinio.

La 2-a n-ro de "Enciklopediaj Scioj", gazeto eldonita de la Beijing-a Enciklopedia Eldonejo en junio de 1979, publikigis la esploran raporton "Laŭ Strangaj Piedsignoj". Ĝi diris, ke la "Esplora Grupo de Strangaj

Animaloj" formita de laborantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj, koncernaj institucioj kaj altaj lernejoj de Hubei-provinco faris esploran aktivadon pri la "sovaĝuloj" en la dirita regiono en nordokcidenta Hubei-provinco de marto ĝis novembro de 1977. La aŭtoro de la nomita artikolo Liu Minzhuang, docento de la Biologia Fakultato de la Shanghai (Ŝanhaj)-a Normala

Universitato, partoprenis en tiu aktivado. Kun anestezaĵaj pafiloj, teleskopoj kaj fotiloj, la grupoj laboris tie duonjaron. Kvantam ili ne vidis "sovaĝulon", tamen ili trovis multajn piedsignojn, neordinaran fekaĵon kaj harojn. Pli ol 200 vidintoj de sovaĝuloj donis al la esplora grupo informojn pri "sovaĝuloj". Ĉio ĉi tio kredigis tiujn, kiuj antaŭe ne kredis la ekziston de

“sovaĝuloj”, ke en la primitivaj arbaroj de la nordokcidenta Hubei estas speco de granda animalo, nome “sovaĝulo”, kiu povas paŝi kiel homo.

La vasta arbara regiono Shennongjia apartenas al Dabashan-montaro. Tieaj grandaj montoj starantaj unuj post aliaj, kovritaj de arbaroj kaj vualitaj en nubo kaj nebulo estas malofte vizitataj de homoj. Sur la montoj kreskas antikvaj arbegoj. Tie kreskas granda kvanto da ĉiam-verdaj arboj kaj arbospecioj postlasitaj de antaŭ ĉ. 10,000,000 ĝis 80,000,000 jaroj. Laŭ unuapaŝa enketado kaj esplorado de koncernaj institucioj, tie kreskas pli ol 500 specioj de bestoj. La sudokcidenta montpinto de Shennongjia altas 3,053 metrojn super la mara nivelo. Legendo diras, ke la fama farmaciisto Shen Nong en antikva tempo tien venis por serĉi drogherbojn.

Tieaj kamparanoj diris, ke post neĝado, mirindaj piedsignoj aperis sur la neĝkovrita tero. Post degelo de neĝo ankoraŭ restis piedsignoj en koto. En oktobro de 1977, kvarpersona esplora grupo, gvidata de forstisto, trovis en valo 7-8 piedsignojn kun longeco de 0.33 metro. Ili ne estis tre klaraj pro pluvo. Tamen, pro ilia 2-cm-a profundeeco iliaj konturoj estis ankoraŭ facile videblaj. Je pli ol 10 metroj for de tie oni trovis ankoraŭ 9 tiajn piedsignojn. Ili antaŭeniris laŭ la spuroj ĝis krutaĵo kaj trovis centojn da tiaj piedsignoj. Tiuj piedsignoj longas po ĉ. 33 centimetrojn, larĝas 12 centimetrojn je la antaŭa parto kaj 7 centimetrojn je la posta parto. La dikfingro estas pli granda ol la aliaj kvar piedfingroj. La paŝo longas je 50 ĝis 70 centimetroj. La pli granda dikpiedfingro estas

klara signo por distingi la primatojn de la aliaj mamuloj. Pro tio ili konvinkiĝis, ke la piedsignoj ne estas faritaj de urso. La piedsignoj de goriloj kaj simioj ne estas tiel grandaj kaj iliaj piedfingroj ne tiel longaj. Tiuj piedsignoj tre similas al tiuj de homoj, tamen ili montras, ke la plandoj estas ebenaj. Oni faris kemian analizon al la kolektita fekajo de “sovaĝulo” kaj konstatis ke ĝi diferencas de tiuj de bestoj en kvanto kaj konsistigaj elementoj.

Lokanoj donis kolektitajn harojn al la esplora grupo. Post analizo, oni konstatis ke la haroj tre similas al tiuj de homoj. La korpaj haroj mallongaj kaj densaj similas al tiuj de goriloj. La ruĝbrunaj kapharoj longaj je 30 centimetroj similas al tiuj de homoj. La informoj donitaj de pli ol 200 vidintoj montris, ke ĝi estas homsimila supera primato inter homo kaj gorilo. Ĝi altas ĉ. 2 metrojn, ĝiaj gamboj longas 1 metron kaj estas lertaj en kurado. Ĝia korpo surhavas ruĝbrunajn harojn. Ĝia kaphararo pendas ĝis la ŝultroj. La gluteoj estas fortaj. La “sovaĝulo” havas paron da grandaj pendantaj mamoj. Kvankam ĝi ne povas paroli, tamen povas elparoli pli ol 20 malsamajn voĉsignojn. Ankaŭ ĝi povas esprimi sian penson per la buŝo kaj la manoj. Ili aktivadas unuope aŭ duope, maksimume triope, unu granda kun unu malgranda aŭ unu vira kun unu ina. Ili elfosis per la manoj, kelkiam per bastonoj aŭ ŝtonpecoj, terpomojn, mielon, maizojn kaj legomojn, forrabis kokojn, hundojn kaj porketojn, kaj ĉasis muntiaĵojn (Muntiacus), aprojn ktp.

Ili timas homojn kaj forkuras je vido de homo. Sed ili iafoje

luktis kun homoj. Inter la loĝantoj de Shennongjia cirkulas multaj rakontoj pri “sovaĝuloj”. Je la 19-a de junio 1976, virino Gong Yuying estis postkurata de “sovaĝuloj” kaj ŝi apenaŭ sukcesis eskapi per kurego. Matene de la 14-a de majo 1976, kvin laborantoj de la arbara regiono de Shennongjia veturis per ĵipo sur ŝoseo, la ŝoforo la unua rimarkis beston malrapide irantan kiel homo antaŭ ili. Li do lumigis la frontajn lampojn, sonigis la aŭtokornon kaj sturmis al la besto. La besto konsterniĝis kaj sin tiris flanken. Kiam la ĵipo veturis al la loko for de ĝi je ĉ. 2 metroj, ĝi abrupte haltis. La kvin veturantoj ĉiuj ĝin vidis klare. Ĝi estas alta je ĉ. 1.7 metroj. Ĝiaj okuloj similas al tiuj de la homo kaj la korpo estas kovrita de maldikaj haroj. Ĝi havas longan vizaĝon, iom elstaran buŝon, dikajn kaj longajn gambojn kaj grandan postajon. Kiam oni elĵipiĝis por ĝin kapti, ĝi rapide kuris en densan arbaron.

En historiaj literaturoj de Ĉinio la esplora grupo trovis registrojn pri “sovaĝuloj”. Kvankam iliaj nomoj en ili estis malsamaj, tamen iliaj karakterizaĵoj estis similaj. Ankaŭ Li Shizhen, farmaciisto de la 16-a jarcento de Ĉinio, diris en sia verko “Ben Cao Gang Mu”: “Sovaĝuloj” havas multajn harojn kaj lertajn membrojn. Ili estas ridemaj kaj lertaj kapti virinojn. La kroniko de la Fangxian-gubernio en la arbara regiono enhavas jenan priskribon: “Fangshan-monto estas tre alta, kruta kaj senhoma. Ĝiaj ŝtonaj kavernoj estas similaj al ĉambroj. En ili estas multaj har-havaj homoj. Ili estas altaj je pli ol 10 futoj kaj ofte eliras por ŝteli kokojn kaj hundojn.”

Zamenhof ne estis monavida

Pri tio ĉi ni scias el la sekvantaj dokumentoj:

1). El la unua Esperanto-libro (26. 7. 1887). Zamenhof skribas: “Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi.”

2). El letero de 9/21. 5. 1896 al Paul Nysten: “Kontraŭ la fakto, ke Vi ĉerpis el mia ‘Ekzercaro’ por Via lernolibro — ekzercaro, mi absolute nenion havas. Kun plezuro mi permesas al Vi preni el ĉiuj miaj verkoj tiom, kiom Vi volas.”

3). El poŝtkarto de 12/24 IX 1898 al A. Caetano Coutinho Zamenhof skribas: “Por traduki la ‘Ekzercaron’ en lingvon portugalan mi kun plezuro donas al Vi mian plenan permeson.”

4). El poŝtkarto de 19(27). 3. 1903 (poŝtstampo) al Rene Deshayes: “Presigi la ‘Vojon’ Vi havas plenan rajton kaj Vi tute ne bezonas mian permeson pro tio ĉi.”

5). El letero de 20/V. 1905 al generalo Sebert: “Kun granda danko mi ricevis Vian leteron kun la sumo de 376 rubloj, oferitaj por mi de nekonata amiko, por faciligi al mi mian venon al la kongreso. Sed kvankam mi tre alte ŝatas la bonan amikan intencon de la nekonata oferinto, mi tamen tre bedaŭras, ke mi ne povas akcepti la oferitan monon, kiun mi

petas Vin redoni al la oferinto kune kun mia plej sincera kora danko. Mi tute ne kaŝas antaŭ Vi, ke mia veturo al la kongreso estas por mi efektive tre malfacila. Mi havas nenan kapitalon kaj mi vivas kun mia familio de mia ĉiutaga perlaborado; tial la kostoj de la vojaĝo kaj la preskaŭ trisemajna perdo de profesia perlaborado estos por mi efektive sufiĉe pezaj; tamen ankoraŭ pli peza estus por mi la konscio, ke al la unua granda festo de Esperanto mi veturas per fremda mono. Tial mi neniel povas akcepti la grandaniman oferon, kvankam mi estas tre danka al Vi, estimata Sinjoro, kaj ankaŭ al la nobla nekonata oferinto por Viaj amikaj intencoj.”

6). El letero de 20.6. 1905 al la firmo Hachette: “Ofte diver-

saj personoj libervole proponadis al mi procentan pagon de siaj verkoj (ekzemple antaŭ 2 jaroj proponis al mi Stead, St. Martin, Fried, Ahlberg kaj aliaj; poste de Beaufront, kiam li volis eldonadi Bibliotekon de l’ Esperantiste; nun Fruicitier por la Granda Vortaro k. t. p.); sed kvankam mi ĉiam estas en tre premita financa situacio, kaj kvankam ili proponadis al mi la monon simple kiel ŝuldon de dankeco, postulante de mi nenan laboron kaj nenan publikan aprobacion aŭ respondecon, kaj kvankam mi havis plenan rajton akcepti la proponatan pagon, — mi tamen ĉiam rifuzadis.”

7). El letero de 18.7. 1905 al “Tre estimata Sinjoro!”: “Akceptu mian plej koran kaj sinceran dankon por Via propono pagi

Zamenhof en la 5-a Universala Kongreso de Esperanto, en Barcelono, 1909



al mi la koston de mia vojaĝo. Volu tamen pardoni al mi, ke mi tiun proponon ne povas akcepti. Mi tre alte ŝatas Vian bonan deziron, sed mi sentus min tre nebone, se mi vojaĝus ne per mia propra mono.”

8). El letero de 18.7. 1905 al Bourlet: “Al s-ro Breton mi respondis hodiaŭ, ke por lia deziro pagi al mi la kostojn de vojaĝo mi lin kore dankas, sed ke akcepti tion ĉi mi ne povas, ĉar mi sentus min tre nebone, se mi vojaĝus ne per mia propra mono.”

9). El poŝtkarto de 22.1.1906 (poŝtstampo) al E. Lawrence: “Por presi la kantojn, mi de mia flanko kompreneble donas al Vi plenan permeson.”

10). 15. X. 1906 Zamenhof estis en Bruselo kaj 17-23. X. 1906 en Parizo, por en Bruselo kun Charles Lemaire kaj en Parizo kun Emile Javal diskuti demandon pri reformoj de Esperanto. La 23-an de oktobro 1906 Lemaire france skribis al Javal: “Zamenhof foriris. Mi estis korprenita, vidante foriri — tiel perditan en la vasta mondo — tiun duon-Kriston. Li ne volis, ke mi provizu al li seĝon en la luksa trajno ĝis Berlino. Li foriris, en sia humila triaklasa kupeo, kun bombonoj por sia eta filino kaj du brioĉoj por si. Mi opinias, ke li donis al ni admirindan ekzemplon.” (“La nica literatura revuo”. N-ro 21, Januaro-Februaro 1959, p. 83).

11). En la Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono, Hispanio, 1909, D-ro Henri Dor parolis, ke genia elpensado de D-ro L. Zamenhof efektive donis pacon al la homaro for-

igante militojn, proponis al la kongreso klopodi, ke Zamenhof ricevu Nobel-an premion de paco. Zamenhof tre dankis por la propono de D-ro Dor, sed petis, ke la kongreso ne prezentu tiun proponon kaj ne enskribu ĝin en la protokolon. (“Lingvo Internacia” N-ro 189, Septembro 1909, p. 427).

12). El poŝtkarto de 26. 11. 1909 al “Kara kolego”: “El la ‘Proverbaro Esperanta’ Vi povas preni por la vortaro kiom Vi volas.”

13). El letero de 31. 7. 1911 al generalo Sebert: “Pagon por mia vojaĝo mi kompreneble ne prenos; mi nur akceptas (konforme al la ĝisnunaj tradicioj de niaj kongresoj), ke en la kongresa urbo mem mi kaj mia edzino estos gastoj de la kongreso kaj ne pagos por nia loĝado kaj manĝado. Miaj filo kaj filino kompreneble ne estos gastoj de la kongreso; por iliaj kongresaj kartoj kiel ankaŭ por ilia loĝado, manĝado k.t.p. mi pagos mem.”

14). El letero de 27. XII. 1912 al B.E.A.: “Preni ian pagon pro la frazoj, kiujn fraŭlino Fryer ĉerpis el mia Ekzercaro por sia lernolibro, mi absolute ne konsentas. Mi kore dankas la konsilantaron de Via Asocio pro ĝia decido sendi al mi pagon, sed tiun pagon mi akcepti ne povas.”

15). El poŝtkarto de . . . al. . . : “La artikolo ‘Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia’ estas verkita ne de s-ro de Beaufront, sed de mi (sed mi deziras, ke ĝi restu anonima). Kun plezuro mi donas al Vi plenan permeson represi ĝin kune kun rusa tra-

duko en via verko. Ankaŭ mian ‘Preĝon’ mi kun plezuro permesas al Vi represi.” (Poŝtkarto estas en la libro “Adolf Holzhaus, Zamenhof leteroj”, n-ro 355).

16). E. Privat en “Vivo de Zamenhof”, 1920, rakontas: “Klientoj pagis kvardek kopekojn — kelkaj eĉ nenion.”

17). N. B. Ĥavkin en la artikolo “Aleksander Silbernik” skribas: “La malriĉaj klientoj ekkonis la bonkorecon de la doktoro, kiu ofte kuracis senpage.” (“Esperanto Internacia” n-ro 10, oktobro 1946, p. 150, 151).

18). Kazimierz Tyminski ĉeestis enterigon de nia Majstro. En artikolo “Ĉe la tombo” li skribas: “Malantaŭ la ĉerko formiĝis multnombra sekvantaro, kiu grandparte konsistis el popolamaso, loĝanta en la hebrea kvartalo; videble la onidiroj pri tio, ke la Majstro senpage kuracis kaj helpis malriĉulojn, estas pravaj.” (“Pola Esperantisto”, N-ro 2. Marto-Aprilo 1956, p. 2).


19). Anatolo Koĥ en “Miaj rememoroj pri d-ro Zamenhof” rakontas: “D-ro Zamenhof estis sola varsovia kuracisto, kiu dediĉis unu tagon semajne por senpaga akcepto de malriĉaj malsanuloj.” (“Nuntempa Bulgario” N-ro 12. Decembro 1958, p. 22).

20). Emilian Loth en siaj “Rememoroj pri Zamenhof” skribas: “Zamenhof ne estis materialisto kaj kiel okulkuracisto li ofte kuracis malriĉulojn tute senpage.” (“Pola Esperantisto”. N-ro 6. Novembro-Decembro 1956, p. 4.).



Rememoro pri mia patro K. Ĉ. Sun

de Ĝeo Sun*



K. Ĉ. Sun

MIA patro K. Ĉ. Sun (1886-1965) estis unu el la veteranaĵoj esperantistoj de Ĉinio. Li eklernis Esperanton en 1909. Tiam li laboris en la Eduka Asocio de Wuxi (Vuhi), Jiangsu (Giangsu)-provinco. Tial li havis ŝancojn kontaktiĝi kaj korespondi kun iuj junuloj, kiuj lernis eksterlande. Yang Zengqiao sendis al li Esperantan libron el Londono. Poste li ricevis multajn Esperantajn librojn kaj revuojn senditajn de Hua Nanguo kaj aliaj ĉinaj studentoj en Parizo. Li tre ĝojis pro tiuj esperantaj kaj estis forte altirita de la idealo kaj utileco de Esperanto. Li decidis posedi tiun lingvon kaj kontribui por ĝia disvastiĝo en Ĉinio.

En 1912 mia patro transloĝiĝis al Shanghai (Ŝanhajo). Tie li trovis fervorajn s-anojn K. C. Ŝan, Lu Shiqing, Xiong Ziyang kaj Lü Tongsheng kaj kune kun ili iniciatis Esperantan grupon, kiu funkciigis vesperan kurson de Esperanto. Nelonge poste, la grupo ŝanĝis sian nomon en la

Hinan Esperantan Asocion (ĤEA), kaj fondiĝis la Centra Oficejo de ĤEA, kiu sidis en Shanghai. Poste aperis sinsekve oficejoj en Qingdao (Kingdaŭ), Guangzhou (Kantono), Nanjing (Nankino), Changsha (Ĉangŝa), Changshu (Ĉangŝu) kaj aliaj lokoj. Sub la aŭspicioj de la Centra Oficejo inaŭguriĝis la Esperanta Koresponda Lernejo kaj la Esperanta Lernejo kun tre multaj lernantoj. La instrua materialo eldonita de la koresponda lernejo fariĝis la unua lernolibro por la ĉinaj komencantoj.

En la unuaj jaroj de la Respubliko de Ĉinio Esp-movado estis tre malfacila. Tiutempe, kvankam la Revolucio de 1911 gvidata de Sun Zhongshan (Sun Jatsen) renversis la feŭdan dinastion, tamen ĝi ne liberigis la ĉinan popolon el duonkoloriismo kaj duonfeŭdismo. La frukto de la revolucio estis uzurpita de norda militaristo Yuan Shikai. Post lia morto la diverslokaj militaristoj subinstigitaj de imperiistoj militadis unu kontraŭ alia, kaj la ĉina popolo dronis en senfina sufero. La asocion kaj la lernejojn turmentis financaj malfaciloj. Kelkfoje niaj samideanoj devis vendi aŭ lombardi siajn vestojn, juvelojn kaj aliajn objektojn por daŭrigi laboradon. Ili vivis tre malfacile, tamen ne ŝanceliĝis ilia decido propagandi Esperanton. Ili helpis unu alian kiel samfamilianoj kaj venkis multajn malfacilojn, tiel ke la

koresponda lernejo daŭris kvin jarojn. Poste ĝi ĉesis funkcii pro nestabileco de la politika situacio.

En 1917 Beijing-universitato iniciatis Esp-an kurson. Ĝi estis la unua universitato de Ĉinio, kiu instruis Esp-on. Kun granda ĝojo mia patro akceptis la inviton de universitatestro Cai Yuanpei esti lektoro de Esperanto. Ĉar en liaj Esp-aj paroloj verŝajne multis la vorto "estas", tial la komencantoj moknomis lin "S-ro Estas". Por instruado li kompilis Krestomatieton de Esperanto kaj Plenajn Gramatikon de Esperanto. En 1922 ilin aperigis la Komerca Presejo, la plej granda eldonejo en tiu tempo. Li funkciis sisteme kiel delegito de UEA en Beijing.

Komence de la dua jardeko mia patro konatiĝis kun fama japana esp-isto Ossaka Kenji kaj rusa blinda poeto Eroŝenko. Ankaŭ ili instruis Esperanton en Beijing-universitato. Poste la reakcia registaro malpermesis Esp-instruadon, kaj mia patro forlasis la universitaton kaj kun siaj familianoj revenis al Wuxi. Post kelkaj jaroj li instruis la ĉinan lingvon en iu mezlernejo ĝis la Liberiĝo de la lando.

Tiam li estis jam maljuna kaj emeritiĝis. Li vivis plu en Wuxi kelkan tempon. Poste li transloĝiĝis al Nanjing kaj tie li havis honoron partopreni en la Popola Politika Interkonsili-

Bakin elektita kiel aganta prezidanto de ĈVA

La 20-an de aprilo la prezidantaro de la Ĉina Verkista Asocio okazigis plivastigitan kunvenon, en kiu Bakin estis unuvoĉe elektita kiel aganta prezidanto de la asocio (ĝia antaŭa prezidanto estis Mao Dun, kiu forpasis antaŭ nelonge). Li estis elektita ankaŭ kiel ĉefkomitatano de la Literatura Premi-komitato de Mao Dun.

Lia propono pri fondo de la Domo de Ĉina Moderna Literaturo estis aprobata de ĉiuj ĉeestantoj. En la kunveno li decidis donaci 150,000 juanojn el sia honorario kiel fonduson por fondi la domon kaj ĉiujn siajn manuskriptojn kaj materialojn.

Bakin estas laborema kaj fekunda verkisto. En sia 23-jara aĝo li jam aperigis sian romanon "Pereo". Poste li verkis la romanojn "Trilogio de Amo" ("Nebulo", "Pluvo" kaj "Fulmo") kaj "Trilogio de Torento" ("Familio", "Printempo" kaj "Aŭtuno"), la mezlongajn



Bakin

romanojn "Frosta Nokto" kaj "La Bienkorto Qiyuan", pli ol 20 novelojn kaj multajn eseojn. Li ankaŭ ĉinigiis pli ol 30 famajn verkojn alilandajn. Nun li verkas la romanon "Paro da Belaj Okuloj" kaj tradukas en la ĉinan lingvon la rememorojn de rusa verkisto A. I. Hercen "Pasinteco kaj Penso".

Bakin estas ne nur fama verkisto sed ankaŭ eminenta esperantisto. Li funkcias kiel vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo. En la 20-aj jaroj li ellernis nian lingvon kaj skribis "Esperanto kaj Literaturo". Poste li skribis en Esperanto "En Mallumo", "Fratoj" k.a. kaj ĉinigiis el Esperanto literaturaĵojn, kiel "Printempo en la Aŭtuno", "La Floro de l' Pasinto" kaj "La Morto de Danton". En 1980 lia mezlonga romano "Aŭtuno en la Printempo" estis esperantigita kaj eldonita de nia redakcio. En la sama jaro la Ĉina Esperantista Delegacio kun li kiel estro partoprenis en la 65-a UK en Stokholmo.

Dum la lasta duonjarcento Bakin havis plenan zorgadon pri Esp-movado. Li profunde konvinkigis, ke "Esperanto certe fariĝos komuna lingvo de la homaro". Lia aganta prezidanteco kuraĝigos, sendube, la ĉinajn esperantistojn.

ĝa Konferenco de la provinco Jiangsu. Por danki la popolan registaron pro ĝia zorgado, li donacis al la Biblioteko de Wuxi pli ol 200 Esp-ajn librojn, kiujn li konservis multajn jarojn.

En 1963 li transloĝigis al Wuhan kaj vivis kune kun ni. Li tre ĝojis, ke li propraokule vidis la prosperiĝon de Esp-movado en tiu urbo. Laŭ peto de la redakcio de EPĈ, li verkis por ĝi la artikolon "Rememoroj pri Ĉina E-movado", en kiu li rememoris pri la malfacila


vojo trairita de la ĉina E-movado. Li finis la lastan alineon de sia artikolo per la jenaj vortoj: "Pasis jam kvindek jaroj. Hodiaŭ, kiam 'kune floras cent floroj', ankaŭ la Esperanta movado reviviĝis kvazaŭ velkinta arbo en printempo. Mi tre ĝojas ke mi vidas propraokule la prosperiĝon de la Esperanta movado en Ĉinio." Bedaŭrinde, li suferis kronikan malsanon kaj forpasis je la 14-a de decembro, 1965. Li ne vidis novan progreson de la Esperanta movado en Ĉinio.

Nun nia provinco Hubei kaj nia urbo Wuhan jam fondis sian Esp-asociacion, kaj Esp-movado iom post iom revigliĝis en Shanghai, Beijing, Wuxi kaj Nanjing, kie mia patro vivis kaj laboris. Hodiaŭ niaj kondiĉoj estas multe pli bonaj ol la liaj. Ni devas, kiel li, peneme labori kaj senlace klopodi por disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

* La aŭtoro estas vicprezidanto de la Hubei-a Esperanto-Asocio kaj prezidanto de la Wuhan-a Esperanto-Asocio.

Ĉe Fuchun-rivero

Fotoj de LI CHUNGENG



Tongjun-monto apud
Fuchun-rivero




Barajo de la
Fuchun-rivera
Hidroelektrejo



La urbeto Tonglu apud Fuchun-rivero



La Okcidenta Rigardejo
de Yan Ziling



Qingjiang-ponto

Gui la riveran pejzaĝon
sur la Cikonia Monto



FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ



Aŭtuno kaj vintro en la montoj de la nordokcidenta Svedio

de HALDO VEDIN (Svedio)





Pejzaĝoj de Fuchun-rivero

de XIAO XUESHENG

FUCHUN-RIVERO estas ne granda en Ĉinio, tamen altiras al si sennombrajn literaturistojn kaj pentristojn per siaj ĉarmaj pejzaĝoj. Multaj poemoj kaj epigrafoj gravuritaj sur memorŝtonoj en la historio prikantas ĝian ĉarmecon. La granda pentristo Huang Gongwang de Yuan-dinastio en la 14-a jarcento, logita de la beleco de Fuchun-rivero, fikslogis tie en siaj lastaj jaroj. Estiel pli-ol-80-jara maljunulo, li pentris "Fuchun-riveraj Pejzaĝoj" longan je 7 metroj. Post 600 jaroj oni trovis nur ĝiajn du restaj-pecojn, kiuj tamen ne perdis sian valorecon kiel raraĵo de la ĉina pentrarto. La nuna ĉina fama maljuna pentristo Ye Qianyu kvarfoje veturis sur la rivero por trovi pentrindaĵojn. En printempo de 1980 li verkis longan mirigan pentraĵon "Novaj Pejzaĝoj de Fuchun-rivero".

Jam de longe mi deziris rigardi la belajn pejzaĝojn de Fuchun-rivero kaj tiu deziro efektiviĝis nur en aprilo ĉijare. La rivero kun longeco de 110 kilometroj situas en la norda Zhejiang (Ĝegiang)-provinco, ĝia supra parto ligiĝas kun Xin'an-rivero kiu fontas de Huangshan-monto kaj ĝia malsupra parto kun Qiantang-rivero fluanta en Hangzhou-golfon. Matene mi kaj mia kolego ŝipveturis okcidenten de la fama pitoreskejo Hangzhou (Hangĝou) bordanta Qiantang-riveron, kaj post malpli ol 3 horoj ni atingis la unuan vidindejon de la rivero — la Cikonian Monton.

La monto estas ne tre alta, tamen leviĝas sur ebena tero, baras la

iradon de la rivero kaj turnas la riverfluron sudorienten. Ĉe ĝia piedo la rokoj etendiĝas en la riveron kaj faras la impreson kvazaŭ cikonio trinkanta ĉe la bordo. Tial ĝi ricevis la nomon.

Ni surgrimpis la monton laŭ ĝia okcidenta ŝtonŝtuparo. Antaŭ ni staras teraso ĉ. 30 metrojn alta kun ŝtonaj balustradoj ĉirkaŭe. Ĝia bazo estis urbomuro antaŭ 300 jaroj. En la centro kreskas alta kamforarbo nebrakumebla eĉ por du personoj kun brakoj interligitaj, kun prosperantaj branĉoj kaj ombroriĉa foliaro. Okcidente de la teraso staras duetaĝa pavilono, fronte al la rivero. Sub ĝia alero pendas ŝildo "La Unua Pavilono de Fuchun-rivero". La unua etaĝo estas por te-salono kie oni povas ĝui la ĉarman pejzaĝon trinkante teon. En la supra etaĝo prosperas multaj envazaj floroj, la delikata odoro de orkideaj floroj faras la pavilonon aparte agrabla.

Ni iris post la pavilonon kaj surgrimpis laŭ ŝtonaj ŝtuparoj. La montsupro estas ebena. Tie antaŭe estis multaj konstruaĵoj, el kiuj la plej fama estis la templo Jixiang, konstruita en Tang-dinastio antaŭ pli ol mil jaroj. La granda poeto Su Dongpo de Song-dinastio en la 11-a jarcento plurfoje vizitis ĝin kaj verkis poemojn por donaci al la bonzoj de la templo. Poste oni ĉizis sur rokmuro fronte al la rivero la ideografiaĵojn signifantajn "Ascendi al Nuboj por Hoki la Lunon" persone skribitajn de li. Nun la rokmuro fariĝis bona loko de fota-

do por turistoj. En la templo estis granda sonorilo. Matene kiam la bonzoj faris preĝon, ĝia laŭta sonorado aŭdeblis en la spaco kun diametro de ĉ. 20 kilometroj. En centoj da jaroj "la templo kun tagiĝa sonorado" estis pejzaĝo plena je poezio kaj pentrindeco. Estas bedaŭrinde, ke la templo estis ruinigita kaj la sonorilo perdiĝis. Anstataŭ la matenan sonoradon, oni nun aŭdas nur voĉlegadon de lernantoj en mezlernejo ĉe la montpiedo aŭ iliajn gajajn parolojn.

Falis pluveto kiam ni surmonte rigardis la pejzaĝon, kaj ĉio vualigis: La blanka rivero, la sporade moviĝantaj boatoj, la montoj unuj post aliaj, verdaj kampoj kaj vilaĝaj domoj. Ĉio ĉi formas belan bildon pri nebula pluveto de Fuchun-rivero.

Ni revenis al nia ŝipo kaj veturis plu antaŭen. Post nelonge ni vidis mallarĝan kaj longan insuleton. Oni diris al ni, ke ĝi aperis antaŭ malpli ol dudek jaroj. En Fuchun-rivero estas multaj similaj insuletoj formitaj el aluvio, sur ili pompe kreskas arboj kaj diversaj plantaĵoj. Vidante de malproksime ili ŝajnas smeraldoj inkrustitaj sur blank-jada zono. La ŝtato konstruos la insuleton en riveran parkon kaj bredos tie fiŝojn kaj salikokojn. La rivero abundas je makruoj (*Macrura reevesii*), kies viando estas delikata kaj bongusta. Tie hokkapti kaj drinki kun vaporkuiritaj makruoj kiel almanĝaĵo, ja estas bela ĝuo!

Post kiam nia ŝipo preterpasis iun gubernian urbon je ĉ. 12 km, ni renkontis unu baraĵon, kiu tranĉas la riveron en du partojn, ĝi estas la Fuchun-rivera Hidroelektrejo konstruita en la kvindekaj jaroj. Trapasinte la baraĵon ni trovis, ke la montoj unuj post aliaj sin etendas en la akvon kaj sekve la rivero fariĝis mallarĝa kaj zigzaga. Tie troviĝas la fama pitoreskejo "Rigardejo de Yan Ziling".

Yan Ziling vivis en la unua jarcento, li lernis en sia juneco kune kun Liu Xiu kaj ili fariĝis bonaj amikoj. Poste Liu Xiu fariĝis imperiestro, sed Yan Ziling ne avidis altrangon, riĉecon kaj komfortan vivon, li venis apud la riveron kaj tie vivis ermite. Pro tio li estis laŭdiata de la posteuloj. Fakte, tie estas du krutaj rokoj konataj kiel rigardejoj orienta kaj okcidenta altaj je pli ol 100 metroj, kiuj etendiĝas demonttalie al la rivero. Ĉar Yan Ziling terkulturis tie kaj hokis ĉe la bordo, la du rokoj fariĝis historiaj vidindejoj.

Ni ascendis deborde supren pli ol 700 ŝtonajn ŝtupojn kaj spiregante atingis montdorson ligantan la du rigardejojn. Sur ĝi estas kvadrata ŝtona kiosko. Oriente kaj okcidente for de ĝi je 100 ŝtupoj estas po kios-

ko sur la du rigardejoj, sed tiu sur la orienta jam falis kaj restas nur la ebena bazo, sur kiu povas sidi pli ol 100 homoj. Antaŭ la orienta rigardejo troviĝas ravino, en kiu staras ŝtona kolono preskaŭ same alta kiel la rigardejo, ĝi similas al juna virino kun levita kapo atendanta sian karulon ĉe borde.

"Yaolin — Paradizo sur la Tero" estas alia turisma loko de la rivero. Ĝi estas kalk-roka kaverno kun sep haloj ene interkondukeblaj kaj longa je ĉ. mil metroj. Ĝia maksimuma alteco estas ĉ. 30 metroj kaj la totala areo — 28,000 kvadrataj metroj. Historia literaturo diras, ke ĝi estis loko ŝatata de turistoj jam en la dinastioj Tang kaj Song (618 — 1279). Poste la kaverna buŝo estis ŝtopita kaj ne plu alvenis turistoj. Kaj restis nur ĉinaj ideografiaj kun la signifo "Yaolin — la Paradizo sur la Tero" sur ĝia rokmuro ĉe la pordo. La kaverno nun estas riparita, kaj la unua halo malfermiĝis al turistoj.


Ni iris malsupren en malpeza nebulo laŭ spirala ŝtona ŝtuparo lumigata de lampetoj. Irante en mal-lumo ni ne povis vidi malproksimen. Ni descendis ĉ. cent ŝtupojn kaj aperis antaŭ ni halo simila al palaco. Tre bela kaj luksa estas la

halo kun areo de 4,800 kvadrataj metroj ornamita de diversformaj stalaktitoj.

Gvidisto rakontis al ni legendon: Antaŭ tre tre longa tempo sep feinoj venis al la bordo de Fuchun-rivero por sin amuzi, ili eniris la kavernon por ripozo kaj eĉ forgesis hejmeniri pro la ĉarmo. De tiam la kaverno fariĝis amuza loko de la feinoj. Tiu bela legendo donis al la kaverno misteran koloron.

Returnante la kapon, ni vidis grandan rokmuron starantan antaŭ la halo, kun truego en la centro simila al pordego bonveniganta la feinojn. Enirinte la pordon ni vidis podion en profundo, sur kies volbo pendas stalaktitoj kvazaŭ multaj palacaj lanternoj. Dekstre antaŭ la podio staras stalagmitaj kolonoj kun formoj de leono, tigro kaj aliaj bestoj kaj birdoj. Maldekstre de la fronta parto de la halo troviĝas lageto kun lagenaria formo, de tie leviĝas malpeza nebulo. Legendo diras, ke la sep feinoj sin banis iam en la lageto.

Nun la koncernaj institucioj riparas la historiajn lokojn, konstruas turismajn servojn kaj malfermos turisman linion de Hangzhou, tra la riveroj Fuchun, Xin'an, ĝis Huangshan-monto.



Novaj kajo kaj hotelo ĉe Fuchun-rivero

JARKUNVENO DE 1981 DE LA HUBEI-A ESP-ASOCIO

La nomita kunveno okazos de la 25-a ĝis la 31-a de julio en Huangshi, la dua granda urbo de Hubei-provinco. Ĝi enhavos la Duafojan Esperantistan Kunloĝadon kaj la Unuan Esp-konkurson.

La Duafojan Esperantistan Kunloĝadon partoprenos samideanoj el diversaj lokoj, kiuj interŝanĝos spertojn en la studo, propagando kaj disvastigo de Esperanto kaj faros prelegojn kaj paroladojn.

La Unua Esp-kurso okazos nur por komencantoj post oktobro, 1976. Ili konkursos en verkado, parolado kaj prezentado de programeroj. La Esp-instituto de la nomita asocio donos sukcesatestojn kaj memorigaĵojn al la unuaj tri plej elstaraj komencantoj en ĉiu konkurso.

NOVA PROGRESO DE ESP-MOVADO DE WUHAN

En Wuhan, la plej granda urbo de Hubei-provinco ĉe la meza Changjiang (Jangzi)-rivero, la Esp-movado akiris novan progreson. Post la fondiĝo de la Wuhan-a Esp-Asocio en junio de la lasta jaro, la nombro de ĝiaj membroj pliiĝis de pli ol 30 al 120. En la urbo funkciis kvar postlaboraj Esp-kursoj unu post alia, kiujn vizitis 1,500 homoj, kiuj plejparte estas oficistoj, scienc-teknikaj laborantoj, instruistoj de mez- kaj alt-lernejoj, laboristoj, ĵurnalistoj, literaturaj kaj artaj laborantoj. En aprilo de la kuranta jaro la radiaj kaj televidaj stacioj de Hubei-provinco kaj la urbo Wuhan funkciigis alian Esp-kurson.

De la pasinta jaro la Wuhan-a Esp-Asocio varme akceptis fremdlandajn esperantistojn kaj esperan-



tistajn delegaciojn kaj organizis siajn membrojn por korespondi kun samideanoj de Rumanio, Japanio, Francio, FR Germanio k.a.

ESPERANTA STUDRONDO EN LA HUNAN-A NORMALA INSTITUTO

La Hunan-a Esperanto-Asocio funkciigis du Esp-kursojn en la Hunan-a Normala Instituto kaj bakis nombron da esperantistoj. En la 14-a de marto de la kuranta jaro iuj samideanoj en la instituto iniciatis Esp-studrondon por lerni kaj propagandi Esperanton.

NOVAJ ESP-KURSOJ EN CHENGDU KAJ CHONGQING

En la kuranta jaro en la nomitaj du urboj de Sichuan-provinco aperis 7 Esp-kursoj kun pli ol 300 lernantoj. La kursoj de Chengdu estas funkciigita de la Urba Kultura Domo, kun Ning Shouren, ĝenerala sekretario de la Chengdu-a Esperanto-Asocio kiel la instruisto, kaj tiuj de Chongqing estas sub la aŭspicioj de la Esp-Asocio de Chongqing kaj havas lokon en la urbocentro, la Jiangbei-a Distrikto kaj Baxian-gubernio en la antaŭurbo por doni oportunon al la kursanoj.

EKFUNKCIIS SCIENCA ELDONA CENTRO, LA TRIA OFICEJO DE UEA EKSTER NEDERLANDO

Laŭ interkonsento inter la reprezentantoj de UEA kaj tiuj de Hungara Esperanto-Asocio, la Budapeŝta Esperanto-Centro de UEA pri Eldona kaj Scienc-teknika Agadoj oficiale ekfunkciis la 1-an de aprilo.

La unuaj scienc-teknikaj verkoj projektitaj por eldono estas tiuj pri geologio, organika kemio kaj meteorologio. Tio iagrade kontentigos la postulojn el Irano, kie la novaj lernantoj unuavice serĉas sciencan kaj teknikan literaturon. Ankaŭ la riĉa eldona sperto de HEA kaj relative malaltaj produktkostoj por presado en Budapeŝto avantaĝe kontribuos al la agado de la nova centro.

30-A DATREVENO DE LA FONDIĜO DE KLEG KAJ DE "LA MOVADO"

La 29-a Kansaja Kongreso de Esperantistoj en Japanio okazis la 13-14-an de junio en Sakai, gubernio Oosaka, kun diversaj programeroj interalie festaj por la 30-a datreveno de la fondiĝo de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj.

Ankaŭ "La Movado", komuna organo de 4 gravaj distriktaj Esp-ligoj de Japanio inkluzive de KLEG, festis sian 30-jariĝon en februaro ĉi-jare per la n-ro 360. En tiu numero kaj ĝia speciala aldono aperis mesaĝoj de centoj da esp-istoj kaj dekoj da grupoj kaj organizaĵoj.

JUBILEO DE KLUBO ESPERANTISTA DE MALMO, SVEDIO

La nomita klubo havis sian 75-jaran jubileon 5-8 junio ĉisomere. Ĝi havas ĉirkaŭ 200 membrojn kaj ĝia organo estas "La Folio", kiu kvankam malgranda enhavas ĉiam interesajn informojn pri la kluba vivo kaj la loka Esp-agado.

Aperis ankaŭ bela turist-broŝuro pri Malmo, kun multaj bildoj montrantaj vizitindajn lokojn de la urbo.

INTERNACIA EKSPOZICIO DE INFANPENTRAĴOJ EN HOŘICE

Esperanto klubo en Hořice denove organizos grandan internacian ekspozicion de infanpenetraĵoj. Aĝo 5-15 jaroj, temo kaj formato liber-volaj. Penetraĵojn kun nomo, aĝo kaj sekso de la aŭtoro surdorse sendu al František Patera, Ĉsl. armady 1027, CS-508 01 Hořice, Ĉeĥoslovakio.

Ĉiu infano ricevos Esp. dank-ateston kaj multaj ankaŭ la koloran katalogon de la plej belaj penetraĵoj. Speciala rekompenco por kolektivaj kaj transmaraj sendaĵoj.

PROTEKTADO DE RAJTOJ DE LA INFANOJ

Srilanka Societo por Protektado de la Rajtoj de la Infanoj eldonis broŝureton en Esperanto celantan alvoki la homojn en la tuta mondo kunhelpi por ke la Ĉarto de la Infano fariĝu vivanta realeco.

En tiu broŝureto la societo kondamnas la neglektadon de la bon-

farto de la infanoj kaj la altajn elspezojn por militaj celoj. En unu el la punktoj de sia agadplano la societo sugestas, ke "oni apartigu la elspezojn por militaj celoj de la mondo por unu tago, por doni tiun sumon al la bonfarto de la monda infanaro".

En la fino de la broŝureto estas aliĝilo uzebla por personoj, kiuj konsentas kun la celoj kaj pretas helpi, aliĝante al la societo. Adreso: Sekretario de Srilanka Societo por Protektado de la Rajtoj de la Infanoj, 185 Baseline Road, Colombo-9, Srilanka.



Foto el la festo de la novjara kuko, kiun la grekaj geesp-istoj celebras ĉiujare en januaro kun granda sukceso. De dekstre la tria estas s-ino Manousou, prezidantino de la Helena Esperanto-Asocio kaj filino de s-ro Anakreon Stamatiadis, kiu estis famekonata esperantisto de Grekio kaj fondinto de la nomita asocio. Sur la tablo estas la kuko kun la tradicia monero en ĝi.

LIBROJ NOVE RICEVITAJ

La faraono (bildrakonto), eld.: Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 16.5 × 23.5 cm. 44 p. Prezo: 4.8 ned. gld. Aĉetebla ĉe la Hungara Esperanto-Asocio (adr.: Budapest, Pf. 193, H-1368, Hungario).

Esprimo de sentoj en Esperanto (de E. Privat), nova eld. fare de la Internacia Esperanto-Instituto, (Den Haag, Nederlando). Formato: 12 × 16.5 cm. 62 p. Prezo: 7 ned. gld. aĉetante minimume 3 ekz. samtempe, oni ricevos rabaton de 33%.

La vivo estas tute alia 32-paĝa broŝuro en formato de 15 × 21 cm. kun 147 instruaj kaj admonaj dirajoj esperantigitaj de F. W. Poppeck. Prezo: 3.50 germ. markoj + 0.90 gmk. por afranko aŭ 5 rkp. Havebla ĉe Esperanto-Informejo, Lohmuhweg 1, D-7602 Oberkirch, FR-Germanio.

Burgoj kaj kasteloj eld. EK La Progreso de la Parko de kulturo k ripozo en ĉeske Budejovice. 14.5 × 20 cm. 40 p. Kolekto de lakonaj notoj pri historiaj konstruaĵoj en suda Bohemio kun ilustraĵoj. Prezo ne montrita.

Bivisto

Liu Dehai



Liu Dehai ludas en FR Germanio.

MALRAPIDE malfermiĝis la kurteno kaj vidiĝis sur la scenejo fremdlanda orkestro kaj ĉina muzikisto kun bivo en la maldekstra brako. Ili estis la Bostona Simfonia Orkestro de Usono kaj Liu Dehai de la Ĉina Centra Filharmonio kune ludantaj la bivan konĉerton "Fratinetoj sur la Stepo" sub la direktado de la fama direktisto Seiĝi Ozava.

Bivo estas unu el la ĉinaj antikvaj muzikiloj. En la antikveco la bivo estis la komuna nomo de la plukaj muzikiloj. Ĉ. la 3-4 jarcento p. K. la kurba-kola liuto de Hindio kaj Persio estis enkondukita en Ĉinion, iom post iom transformiĝis en plukan muzikilon de han-nacieco. En Tang-dinastio (618-907 p. K.) la bivo-ludado rimarkinde disvolviĝis. La fama poeto Bai

Juyi de Tang-dinastio verkis poemon "Kanto de Bivo", kiu priskribas mizeran travivaĵon de bivistino kaj lian simpatian al ŝi. La poemo montris, ke tiutempa solludado de bivo atingis relative altan nivelon. La biva konĉerto "Fratinetoj sur la Stepo" komponita kaj ludita de Liu Dehai levis la bivan ludadon al nova etapo. Li per siaj lertaj fingroj prezentis sur la bivaj kordoj, kiel du 12-13-jaraj fratinetoj luktadis kontraŭ neĝŝtormo por protekti ŝafaron de popola komunumo. La muzikajo kondukis la aŭskultantojn sur frostan stepon kaj donis al ili ĝuon de belo.

La 43-jara Liu Dehai ludis bivon jam 30 jarojn. En 1949, kiam fondiĝis la nova Ĉinio, li komencis viziti mezlernejojn kaj tiam li jam tre ŝatis ludi fluton,

erhu-on* kaj ankaŭ bivon kaj trikordan muzikilon. Li estis membro de la Amatora Tradicia Instrumenta Orkestro de la Shanghai-a Popola Radio, kaj krome li organizis naci-muzikilan orkestron de mezlernejoj. Tiuj aktivadoj metis bazon por ke li poste okupiĝu pri ludo de naciaj muzikiloj. En 1957 li sukcesis en la enira ekzameno por la Centra Konservatorio, kie li ĉefe studis bivo-ludadon krom muzikan teorion kaj pianan ludadon. Post 3-jara studado li diplomiĝis kaj restis en la konservatorio por labori kiel instruisto. Li kaj instruis kaj faris bivo-ludadon, kombinante la teorion kun la praktiko. En 1970 li estis transpostenigita al la Centra Filharmonio kaj fariĝis ĝia bivisto. Por esplori la efekton de bivo-ludo li studis perkut-muzi-



Liu Dehai kaj fama direktisto Fledler

kilan ludon de la pekina opero du jarojn.

La klasikaj muzikaĵoj luditaj de Liu Dehai devenis grandparte el la ĉinaj klasikaj muzikaĵoj. Li opinias, ke estante muzikisto, li devas heredi kaj disvolvi la eminentan kulturon de la patrolando. La klasika muzikaĵo "En Embuskado" estas granda komponaĵo de bivo ofte ludata de Liu Dehai. La rakonto priskribita en la komponaĵo cirkulis inter la popolo jam en la posta periodo de Ming-dinastio (1368-1644 p. K.). Ĝi priskribas grandiozan scenon de la batalo inter du armeoj en la antikveco. Tiu klasika komponaĵo de bivo ludita de li per lakona plektrado sentigis grandiozecon, kortuŝecon kaj delikatecon kaj kondukis la aŭskultantojn kvazaŭ en la veran batalon. Alia klasika komponaĵo "Sunsubiro" ludita de li priskribis en lirika melodio la sunan malleviĝon, fiŝsipojn hejmenrevenantajn en vespero, prikantante la belan naturon de la patrolando. En ludo de modernaj komponaĵoj Liu Dehai

atentas prikanti la novan vivon kaj la diligentan laboron de la popolo por la bela morgaŭo.

La sukceso de Liu Dehai en la bivo-ludo montriĝas en tio, ke li kuraĝas rompi la kateniĝon de tradiciaj teknikoj kaj fari renovigon. La unufingra plektardo kreita de li en la ludo riĉigis la esprimon de kanta melodio de la antikva bivo. La frekvenco de la unufingra plektrado estas kompare rapida, ĝia fortecovariigo — granda kaj la tembro — delikata kaj abunda, sen brua sono. Li kreis tiun teknikon post ripetada esplorado de alia samspeca ĉina muzikilo. En la ludo de la konĉerto "Fratinetoj sur la Stepoj" li uzis unufingran plektradon por krei profundan, fortan kaj malvarman tembron. Krome, li aldonis kordo-premon de la maldekstra dikfingro, tio kreis plurajn harmoniojn, kiuj reliefigis fortecon kaj tembran variigon de bivo.

Printempe de 1979, kiam la Bostona Simfonia Orkestro vizitis Ĉinion, s-ro Seiĝi Ozava alte

taksis la eminentan bivo-ludon de Liu Dehai. Laŭ lia invito Liu Dehai kunludis kun la Bostona Simfonia Orkestro la konĉerton "Fratinetoj sur la Stepoj" en Beijing (Pekino) kaj Bostono, kun grandega sukceso. La Filipa Diska Kompanio de Nederlando surdiskigis la muzikaĵon. Iu fremdlandano diris post aŭskultado de lia ludo: "Antaŭe mi sciis nur gitaron de la okcidenta duonsfero, nun mi scias ankaŭ bivon de la orienta duonsfero." Iu usona ĵurnalo diris: "Ni ne atendis, ke la bivo povas produkti efekton de orkestro."

De la jaro 1963 li vizitis pli ol 20 landojn, inkluzive de Japanio, Francio, Italio, FR Germanio, Aŭstrio kaj Usono, kaj prezentis al ili klasikajn kaj modernajn bivo-muzikaĵojn kun ĉina karaktero kaj adaptitajn alilandajn komponaĵojn.

Liu Dehai devenis ne de muzikista familio. Lia avo estis komizo de sal-butiko. Lia patro laboris unue en butiko de elektraj materialoj kiel metilernanto kaj poste okupiĝis pri hidroelektra konstruado. Estas absolute ne hazarde, ke li gajnis tiel altan reputacion en la bivuludo. Li opinias, ke por akiri sukceson en arto, antaŭ ĉio oni devas riski sin en arta provo kaj prezenti laŭeble ĉion novan, eĉ ne tre maturan trovitan en observado, studado kaj esplorado. Laŭ li, ofte okazas, ke la observado de vivo kaj la arta influo en ordinara tempo naskos fajron de sento en prezentado. Ĝustatempa kapto de tiuj fajreroj certe fortigos artan efekton de muzikisto en prezentado. Liu Dehai ne nur estas lerta en bivuludo, sed ankaŭ havas certan konon pri aliaj muzikiloj ĉu

antikvaj aŭ modernaj, ĉu ĉinaj aŭ alilandaj. Surbaze de posedo de kompletaj teknikoj pri bivo-ludo kaj lernado de ĝiaj diversaj skoloj li iom post iom formis sian originalan stilon.

Koncerne al sia arta esprimo, Liu Dehai diris, ke en sia plurfoja vizitado de aliaj landoj li ricevis inspiron, ke por ĝuste disvolvi sian arton, oni devas progresigi siajn bonajn teknikojn de bivo-ludo, asimili bonajn artajn esprimojn ĉu enlandajn aŭ alilandajn kaj senĉese fari renovigon.

Talento venas de diligenteco. Liu Dehai estis tre diligenta jam dum sia studado en la lernejoj. Tiam li sin ekzercis pri bivo-ludo ĉ. 8 horojn ĉiutage, eĉ en vintro li ekzercis sin ĝis tutkorpa ŝvitado. Li lernis de famaj bivistoj de diversaj skoloj kaj ensorbis iliajn bonajn apartaĵojn.

En la lastaj jaroj Liu Dehai resumis sian sperton en bivo-ludo. Ekde 1972 li komencis verki la libron "Fundamenta Ekzercado de Bivo", kiun li nun jam finplenumis. En ĝi li sisteme traktis la historion de bivo kaj ĝian rolon en la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Kaj tio ankaŭ estis unu el la temoj de lia lekcio farita en Goethe-Universitato de Frankfurto de FR Germanio en la ĉijara printempo.

Liu Dehai estas komitatano de la Federacio de Ĉinaj Literaturoj kaj Artistoj kaj konsi-

(Daŭrigota sur p. 36)



Memore al hinda verkisto Tagore

La 7-a de majo ĉijare estis la 120-a datreveno de la naskiĝo de la granda hinda verkisto Tagore.

Memore al tiu monda eminentulo la kulturaj rondoj de Beijing okazigis kunvenon, kaj ĝin ĉeestis pli ol 300 personoj.

Rabindranath Tagore naskiĝis en nobela familio de Kalkuto de Hindio je la 7-a de majo, 1861. De sia infaneco li amis poezion, kaj en sia aĝo de 8 jaroj li ekler-nis verki versaĵon. En la 17-jara aĝo Tagore publikigis sian epeon "Historio de Poeto".

Tagore estis ne nur granda poeto de Hindio, sed ankaŭ granda verkisto, artisto kaj socia aktivulo. Li montris sian elstaran talenton preskaŭ en ĉiu kampo de literaturo kaj arto. En pli ol 60 jaroj li verkis pli ol 50 poemarojn, 20 dramojn, 12 romanojn, pli ol 100 novelojn kaj multajn prozojn, filozofiajn kaj politikajn traktatojn, rememorojn, vojaĝnotojn, leterojn kaj tradukis nombron de verkoj. Krome, li okupiĝis ankaŭ pri komponado kaj pentrado. Li komponis 2,000 belsonajn kantojn. Liaj 1,500 pen-



trajoj estis ekspoziciataj en multaj landoj.

Verkoj de Tagore estis enkondukitaj en Ĉinion antaŭ 60 jaroj. La ĉina granda verkisto Lusin alte taksis lin. Liaj verkoj estis varme akceptataj de la ĉina popolo. En 1924 li vizitis Ĉinion. Li tre ŝatis la ĉinan kulturon kaj havis apartan amikecon al nia lando. Dum la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio Tagore multfoje publikigis leterojn kaj poemojn por riproĉi la japanajn agresantojn, subteni kaj simpatii la kontraŭjapanan aferon de la ĉina popolo. Li estis nia sincera amiko. Li por eterne vivos en la memoro de la ĉina popolo.


“La historiaj radikoj de nealianciĝo”

Jen estas libro, kiu ne temas pri Esperanto nek pri amo, sed pri ĉi tiu ĉi faceto de la internacia politika kaj ekonomia vivo.

Ĝi estas verkita de konata jugoslava teoriulo Edvard Kardelj, Esperante redaktita de Zijo Ajdinoviĉ, esperantigita de Roger Imbert kaj eldonita de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Sarajevo, Jugoslavio. La formato 20 cm. × 13.4 cm. 64 p.; la prezo ne menciita. La lingvo lakona, preseraroj malmultaj. Leginda por esperantistoj, precipe por tiuj kiuj interesiĝas pri la movado de nealianciĝo kaj aliaj internaciaj aferoj, kaj mendebla ĉe la eldoninto.

Kio estas la movado de nealianciĝo? Kiel ĝi sintenas al pluraj internaciaj problemoj? Kian rolon ĝi ludas en la internacia politika kaj ekonomia vivo? Al tiuj problemoj la aŭtoro faris trafan analizon kaj ampleksan studon, kaj donis konvinkajn respondojn. La movado de nealianciĝo, kiel pli malpli unu-

iginta agadforto, naskiĝis en la tempo de la malvarma milito, kiel rezisto kontraŭ la bloka divido de



la mondo kaj la bloka alianciĝo. Ĝiaj forto, unuiĝo kaj rolo pli kaj pli kreskas ĝuste pro tio, ke ĝi luktis kaj daŭre luktas “por la sendependeco kaj egaleco de popoloj en internaciaj rilatoj, por ilia sekureco

kaj paco, por paca kunekzistado de la popoloj kaj ilia aktiva internacia kunlaborado sur la bazoj” de egalrajteco de interesoj, “por senĉese malvastigi la spacon kaj kondiĉojn por la imperiisma politiko kaj la ekonomia ekspluatado al la popoloj, same kiel la eblecon de trudado de ekonomia kaj politika hegemonio super partoj de la mondo”.

Mi tute samopinias kun la aŭtoro, ke la popoloj ne nur ne volas esti pasiva objekto de iuj mondaj redividoj, sed pli forte ol iam ajn luktas por la likvido de ekonomia kaj politika dependeco kaj hegemonio ĉiuspeca. Multaj principoj de la movado de nealianciĝo konkordiĝas kun tiuj tenataj de ni esperantistoj. Ni devas senlace klopodi kune kun la popoloj de la mondo por likvidi la diskriminaciojn ne nur politikan, ekonomian, nacian kaj rasan, sed ankaŭ lingvan. Ni daŭre haku nian vojon, por atingi nian celon.

(ZOU)

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	26.2	11445
			32.0	9365
			30.1	9965
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	19.7	15165
			26.0	11515
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	30.4	9860
			19.3	15510
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.6	11685
			19.8	15145

Por beligi virinojn

Fotoj de LI CHUNGENG

—Vizito al la Chongqing-a Frizejo de Tianjin

Frizado estas laboro por beligi virinojn. Kun la leviĝo de la nivelo de la popola vivo, frizo de la haroj kaj beligo de la vizaĝo estas bonvenaj al ĉiam pli da ĉinaj virinoj, tial tiu arto ricevas ĉiam pli grandan atenton de la publiko.

Antaŭ nelonge frizistoj de la nomita frizejo kaj FR Germanio faris en Tianjin demonstradon de diversaj frizfasonoj.


Frizistoj faras malsamajn hararanĝojn laŭ aĝoj kaj postuloj de klientoj.



Arkpafado estas unu el la tradiciaj sportoj de la li-oj en Wuzhi-montregiono de Hainan-insulo. La foto montras, ke li-aj knabinoj sin ekzercas en celado.


Fotoj de LŬ YINGLIANG
kaj YANG CHANGZHONG

Transsalto de "florpoto" — ŝatata sporto de la baj-aj virinoj de Yunnan-provinco



Thomas Alva Edison

Ŝerco kaj serioze



Thomas Alva Edison

Ĉijare estas la 50-a datreveno de la forpaso de T.A. Edison (1847 — 1931). Por memori tiun grandan inventiston, rumana samideano prof. Toma Macovei alsendis al ni artikolon pri lia vivo kaj ni ĝin aperigas ĉisube mallongigita. Per siaj inventaĵoj Edison faris grandan servon al la homaro, kaj ni ĉiuj ŝuldas al li multajn dankojn. Telefono kaj similaj inventaĵoj de Edison multe faciligis la komunikadon kaj samtempe ankaŭ akiris la bezonon de komuna lingvo en internacia tereno. Vasta apliko de tiaj modernaj komunikiloj produktas movforton al la Esperanto-movado kaj siavice vasat apliko de Esperanto certe povas plivalorigi telefonon, radion kaj televidon. La esperantistaro do havas apartan motivaĵon por memori Edison en koncerno de la komuna afero.

La Redakcio

Iritita pro la senĉesa atributo de genio, per kiu superŝutis lin liaj samtempuloj, Edison, kiu vizitis lernejon nur dum 3 monatoj kaj faris ĉ. 3,000 inventojn, diris al unu el siaj kunlaborantoj: “La genio, mia kara, estas 1% inspiro kaj 99% transpiro.”

Edison naskiĝis la 11-an de februaro 1847 en urbo Milan, ŝtato Ohio, je la tagiĝo de nova teknika revolucio ekfunkciigita de unu el la plej grandaj scien-

caj malkovroj: la elektro. Li vizitis lernejon, kie, same kiel Albert Einstein, li ne lasis kompreniĝi, ke li estas dotita per esceptaj ecoj. Male, la instruistoj konsideris lin “mezvalora infano”.

Sed la malgranda Al, tiel Edison nomiĝis en sia knabeco, observis atente ĉion ĉirkaŭ si, havis fenomenan memoron kaj konstruis ĉiuspecajn miniaturajn konstruaĵojn. Pro tio, lia patrino,

Nancy, klera virino kun larĝa pedagogia horizonto, retiris lin el la lernejo kaj ŝi mem sin okupis pri lia edukado, lasante lin sekvi siajn proprajn inklinojn.

Li ne kontentiĝis per la legado, alproprigante al si la devizon: “Kio estas farita de vi mem estas bone farita.” En la hejma subteretaĝo, transformita de li en laboratorion, li havis ducent kelkajn boteletojn kun diversaj

kemiaĵoj. La surskribo "veneno" sur ĉiu boteleto ŝirmis ilin de fremdaj manoj.

La bezono devigis lin labori ekde sia dekdujara aĝo, kiel vendisto de ĵurnaloj, fruktoj kaj bombonoj, sur la fervojo inter Port Huron kaj Detroit kun distanco de ducent kilometroj. Per perlaborita mono, li aĉetis librojn kaj faris kemiajn eksperimentojn. Per bonvolo de la vagonara ĉefo, li sukcesis eĉ improvizi laboratorion en pakajvagono.

Pli poste, li aĉetis malnovan presmaŝinon kaj iujn ne plu uzendajn literojn kaj presis mem ĵurnalon, agante sola kiel redaktoro kaj kompostisto.

Ne estas mirinde, ke tiaj multaj priokupoj, kvankam prosperaj, ne lasis al la dekkvinjara junulo eĉ malgrandan paŭzon por malstreĉiĝo, amuziĝo aŭ laŭplaĉa ripozo. Cetere, ankaŭ pli poste en plenaĝo, kiam, fariĝinte fama kaj disponanta pri gravaj materiaj rimedoj, li konstruigis al si komfortan vilaon en Florida, li ne havis multan tempon por ĝui ĝin, pro la insistada laboro, kiun li mem altrudis al si, kiel labora abelo.

Bonŝanco venis al li renkonte. Iun tagon, tute hazarde, li savis la vivon de la infano de iu stacidoma ĉefo. Dankema, tiu permesis al li lerni la telegrafan manipulado, kiu vekis pasion ĉe li. La regado de telegrafo estos al li poste tre utila en diversaj cirkonstancoj.

Kelkajn jarojn poste, kiam li laboris ĉe telegrafa oficejo de Boston, kolego el najbara ĉambro multe miris vidante, ke Edison, alveninte iun matenon je la kvara horo post noktogardo

ĉe telegrafo, anstataŭ ripozi, komencis legi libron de Faraday, kiun li ĵus aĉetis de antikvaĵisto. "Adams," diris li, "mi havas ankoraŭ tiom multajn aferojn por fari, kaj la vivo estas tiom mallonga. Mi devos plirapidiĝi!"

Perfektiginte aparaton por indiki telegrafe borsajn kurzojn, Edison hezitis, ĉu li postulu tri aŭ kvin mil dolarojn por tiu invento. Tiam li havis inspiron diri al la prezidanto de aĉetanta societo, doni kiom li trovas dece. Kiel rakontite pli poste, la juna Edison preskaŭ svenis pro mirego kaj ĝojo, kiam tiu oferis al li 40,000 dolarojn. Kiam li prezentis la ĉekon subskribitan al la banko por ricevi la monsumon, la kasisto, por moki lian naivecon, pagis al li la tutan sumon en malgrandaj banknotoj, kaj la dudekunuajara junulo eliris de tie kun la poŝoj tiel ŝveligitaj, ke li timis, ke la polico kaptos lin, prenante lin kiel rabiston.

Fariĝinte tiel posedanto de malgranda havaĵo, li ne pensis pri leĝera vivo kaj distroj, sed muntis al si propran metiejon, kiu etendiĝis laŭŝtupo.

Edison edziĝis en 1871 al Mary Stiwel, laboristino el sia metiejo. Kvankam la inventisto amegis sian fianĉinon, li tamen estis tiel distriĝema, ke en la edziĝa vespero, kaptita de laboro, li forgesis iri hejmen, kie la gastoj atendis lin.

Edison inventis en 1872 ambaŭdirektan sistemon en telegrafio, por pli poste dissendi simultane, sur unu fadeno, kvar kaj eĉ ok telegramojn.

Sed neniu Edisona invento tiel mirigis la mondon, kiel la parolanta maŝino, t. e. fonogra-

fo. Kiam je la 11-a de marto 1878, la famkonata fizikisto Du Moncelle prezentis la fonografon de Edison en kunveno de la Franca Scienca Akademio, akademiano Bugeau eksaltis kvazaŭ bruligite: "Tio estas ĉarlatanaĵo! Ne kredu la amerikanon, ke ni permesos al ventroparolisto* trompi nin!"

Malgraŭ tio, la fonografo sukcesis baldaŭ konkeri la intereson de la eŭropanoj. En Anglio Glandstone konsideris ĝin eĉ "unu el la plej grandaj mirakloj de la tempo!"

Poste ĝi estis perfektigita kaj prenis grandan disvolvon sub la nomo de gramofono, kiu, anstataŭ cilindron por registrado kaj redono de la sonoj, uzis specialajn diskojn kun spiralaj sulkoj. "Kiam estos realigita perfekta redono de la Naŭa Simfonio de Beethoven," pensis Edison, "mi povos diri, ke mi plenumis mian devon."

En 1878 Edison patentigis la telefonon kun indukta bobeno kaj mikrofono kun karbo, kiu larĝigis telefonuzadajn eblecojn.

Edison estas konsiderata poste patro de elektra lumigado, kies realigado — kiom ajn stranga ŝajnas al ni hodiaŭ — devis fronti multajn antaŭjuĝojn. En numero el 1818 de la gazeto "Kölnische Zeitung" (Gazeto de Köln), ekzemple, oni povas legi inter aliaj: "Strata lumigado, el teologia vidpunkto, estas enmiksiĝo en diaj aferoj. La punkto ne devas esti transformata en tagon!"

Disvolvante la esplorojn en larĝa kolektivo de kunlaborantoj zorge elektitaj, sub sia rekta kaj

permanenta gvidado, post tre granda nombro da eksperimentoj, Edison realigis en 1874 la elektran lampon kun karba filamento, unu el la plej grandaj inventoj de la 19-a jarcento.

Edison fundamentis la disvolvon de elektronaj tuboj, kiuj estas bazo de radiofonia industrio nuntempa. Li eksperimentis la unuan senfadenan telegrafon, sur kies bazo Marconi inventis poste la radiotelegrafon. Danke ma pro la ricevita helpo, la lasta konfesis: "Mi neniam forgesos la amikan kuraĝigon, kiun sinjoro Edison donis al mi, tiom grandanime, komence de mia agado!"

Edison apartenas al raraj kreivaj personecoj, al kiuj plene oni agnoskis la meritojn ankaŭ dum ilia vivo. La societo "Pioniroj de Edison" el ekskunlaborantoj, starigis al li monumenton ĉe Menlo Park. La universitatoj en Princeton kaj New York honoris lin per sciencaj titoloj.

En Universala Ekspozicio de Parizo 1889, Edisona fonografo ĝuis la plej grandan sukceson. La inventisto mem estis en Parizo, la centro de ĉies atento. Oni donis al li ankaŭ la titolon de komandoro de Honora Legio, kio lin ĝenis. Kun ĉiuj honoroj oni akceptis lin poste en Anglio kaj Germanio.

Edison inventis ankaŭ la pravaŭon de la hodiaŭa kinematografon. Tamen oni vidis la bildojn ne sur speciala ekrano, sed rekte en la aparato, la spektanto devis rigardi tra grandiga lenso. Multenombraj filmoj estis realigitaj per tiu aparato en speciale konstruita laboratorio.

Multon oni povas rakonti pri la fortostreĉoj de la granda in-

ventisto kaj la ricevita rezultato, dum naŭ jaroj, en la magneta separo de fera erco. Kiam la grandegaj uzinoj Edison, kreitaj ĉi-cele, devis fermi siajn pordojn pro la konkurenco, li montris nenian deprimeman signon, kaj kontentigante sin diris: "Do, ĉio finiĝis! Kaj tamen ni vivis belajn tagojn ĉi tie!"

Li konstruis poste cementan uzinon kaj laboratorion de gisitaj domoj el cemento.

Edison tenis skribite striktan evidentecon de ĉiuj faritaj eksperimentoj. En la entreprenitaj esploroj ĉe West Orange por invento de elektraj akumulatoroj alkalaj, la unuaj dekmil eksperimentoj pruviĝis vanaj. Kiam lia kunlaboranto Mallory montris sian bedaŭron pri tio, Edison respondis al li ridetante: "Karulo, ni akiris tamen sufiĉe. Ni malkovris milojn da faktoj nepermesantaj solvon de donita problemoj!" "Iru al celo per eksperimentoj kaj lernu el eraroj!" estis la devizo de Edison.

Kiom mirinda estis la kreiva imago de tiu homo, el kiu eliris ankaŭ inventoj malgrandaj, iuj eĉ strangaj parolantaj pupoj, preparajo kontraŭ neŭralgio, megafono por surduloj, inkoj en reliefo por nevidantoj. Li proponis al si elektrigi la lifton kaj la kudromaŝinon. Li esploris la bruajn kaŭzojn ĉe fervojoj, kaj lasis al ni la desegnojn de kotona falĉomaŝino. Li ellaboris metodon por konservado de butero kaj de fruktoj. Li ankaŭ konstruis flugbirdon kaj antaŭvidis helikopteron.

Estis do pravigebla la ĉefo de patenta ofico esprimi sian miregon, kiam en nur unu tago, li

estis liverinta tridek unu patentojn sub la nomo de Edison.

Lige kun la strangaj inventoj de Edison kaj kun lia disvolvita sento de humuro, oni rakontas anakŭ, ke liaj vizitantoj — kaj tiuj ne estis malmultaj — miris pro la fakto, ke lia ĝardenpordo estis tro malfacilmova. Fine iu amiko diris al la granda inventisto:

"Teknika genio, kiel vi, devus esti kapabla konstrui pordon, kiu funkciu pli dece."

"Nu," ridetis Edison, "mia pordo estas konstruita genimaniere."

"Ne diru! Vi ridas pri mi."

"En nenia maniero. Mi ligis la pordon al cisterno. Ĉiu el miaj vizitantoj pumpas aŭtomate dudek litrojn da akvo en tiun cisternon."

Li estingiĝis el vivo anime pacigita, kun sento de plenumita devo, je la tagiĝo de la 18-a de oktobro 1931, en agrabla medio de sia familio kaj de siaj kunlaborantoj de West Orange. Ne longe antaŭ sia forpaso, li diris al la edzino: "Se ekzistas io post la morto estas tre bone. Sed se ne ekzistas same estas bone. Mi vivis mian vivon utile kaj mi faris ĉion, kion mi povis fari pli bone."

Edison deklaris: "La plej alta viva filozofio estas labori kreive. La malkovroj de naturaj sekretoj kaj ilia uzado por la feliĉo de la homoj donas al vi kuraĝon kaj forton paŝi venkema en vivo." Li estis la plej feliĉa enkorpiĝo de tiu praktika filozofio homarana.

** Homo kiu praktikas la arton aŭdigi voĉon kvazaŭ el alia fonto ol la parolanto.*

Majkanto

de G. CARDUCCI*

Majo revekas nestojn,
maje vekigās koroj:
urtik' aperas, floroj,
kolubroj, najtingal'.

Tere geknaboj ludas
kaj en aero birdoj:
en inharar' jen rozoj
kaj en okuloj sun'.

Monto, montet', herbejo
flore broditaj ĉarmas:
kantas, elĝermas, amas
akvo, kampar', ĉiel'.

Esperantigis **GIOVANNI
ROATTINO**

* G. Carducci (1835 — 1907) estis fama itala poeto. Ekde 1860 li laboris kiel literatura profesoro pli ol 40 jarojn en Bologna-universitato kaj gajnis la literaturan Nobel-premion en 1906.



Memore

de MARIA FLACH (Brazilo)

Kiam patrino via maljuniĝis
kaj maturiĝis la prudento via,
de longe tro pezega jam fariĝis
kio estis rutinokupo ŝia.

Kiam okuletoj, antaŭe brilaj,
rifuzadas nun miri la naturon
kaj junaj ŝiaj membroj servis viglaj,
nun lacaj ili sentas ne plezuron...

Tiam, fidindan brakon ofertante,
vi konduku ŝin sur facila vojo.
Okazo venos kiam vin plorantan
ne dorlotos ŝi je la lasta fojo.

Facilanime vi klarigu ĉiam
kio ankoraŭ interesas ŝin.
Tro baldaŭ ŝia buŝo plu neniam
kapablos ja pri io demandi vin.

Esperantigis G. O. VASKE

(Daŭrigo de p. 31)

lanto de la Asocio de Ĉinaj Muzikistoj. Li havas "muzikistan familion". Lia edzino Zhuang Yulan estas pianistino de la Ĉina Centra Filharmonio

kaj liaj du filoj fariĝis muzikaj amatoroj sub ilia influo. Liu Dehai diris, ke bivo naskiĝis en la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj kaj nun perfektigās iom post iom, kaj li

volas fari sian kontribuon por prosperigi la nacian arton de nia lando.

* Erhu-o estas unu el la ĉinaj tradiciaj kordmuzikiloj.

Ŝveliĝas la nombro de la urbaj loĝantoj de la mondo

de LI SHIHUA

RAPIDA KONCENTRIGO DE MONDAJ LOĜANTOJ EN URBOJ

Nun la ŝveliĝo de la nombro de la urbaj loĝantoj de la mondo jam fariĝis urĝe studenda kaj solvenda problemo. En la lasta duonjarcento draste kreskis la nombro de la mondaj loĝantoj, precipe tiu de la urbanoj. Laŭ statistiko, en 1925-1950 la nombro de la mondaj loĝantoj pliiĝis de 1,928 milionoj al 2,486 milionoj, kaj en 1950-1980 ĝi pliiĝis de 2,486 milionoj al 4,413 milionoj. Nun la nombro de la mondaj loĝantoj kreskas je 90 milionoj ĉiujare. Oni taksis, ke en la jaro 2000 la totala nombro de la mondaj loĝantoj atingos 6,200 milionojn. En 1950 la nombro de la urbaj loĝantoj estis 698 milionoj, kiuj konsistigis 28.1% de la totala nombro de la mondaj loĝantoj, tamen en 1980 ĝi jam atingis 1,870 milionojn, kiuj konsistigis 42.2% de la totala nombro de la mondaj loĝantoj. En la fino de la kuranta jarcento la nombro de la urbanoj de la mondo atingos 3,200 milionojn,

kiuj konsistigos pli ol 50% de la tuta loĝantaro de la mondo.

En disvolviĝintaj landoj la nombro de la loĝantoj kreskas relative malrapide, sed tiu de la urbanoj tre rapide. En 1950 la nombro de la urbanoj en Usono konsistigis 64% de tiu de la loĝantoj de la tuta lando, kaj en 1980 ĝi jam konsistigis 82.7%. En la sama periodo la proporcio de la urbanoj por la tuta loĝantaro en FR Germanio pliiĝis de 70.9% al 86.4%, en Britio de 77.9% al 88.3%, en Francio de 55.4% al 78.3%, kaj en Japanio de 35.8% al 63.3%. En la fino de la kuranta jarcento la urbanoj de tiuj landoj eble proksimiĝos al la saturpunkto. La nombro de la loĝantoj en la disvolviĝantaj landoj kreskas tre rapide, kaj tiu de iliaj pliiĝintaj loĝantoj konsistigas 90% de la totala nombro de tiuj de la mondo. En tiuj landoj la kresko de la nombro de la urbanoj estas malfrua sed drasta. Oni taksis, ke en la fino de la kuranta jarcento la nombro de la urbanoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko konsistigos ĉ. 40% de la totala nombro de la loĝan-



*Domego en la banka
centro de Londono*

toj en tiuj regionoj. Kun rapida koncentriĝo de loĝantoj en urboj, pli kaj pli multiĝas la nombro de urboj. Nun en la mondo estas 30 urboj, ĉiu kun pli ol 5 milionoj da loĝantoj, kaj 7 urbegoj, ĉiu kun pli ol 10 milionoj da loĝantoj. En la jaro 2000 aperos 60 urboj, ĉiu kun pli ol 5 milionoj da loĝantoj, kaj 25 urbegoj, ĉiu kun pli ol 10 milionoj da loĝantoj.

KIALOJ DE LA ŜVELIĜO

La ŝveliĝo de la nombro de la urbanoj estis kaŭzita ĉefe de disvolviĝo de modernaj teknikoj kaj produktado kaj plimultiĝo de fabrikoj, minejoj, entreprenoj kaj servoj en urboj, kiuj bezonas ĉiam pli multajn laborfortojn. El la alta meĥanizado de agrikulturo rezultis multaj superflua laborfortoj en la kamparo, kiuj devis iri al urboj por serĉi okupon. Plejparto de la disvolviĝan-

taj landoj prenas urbojn kiel lokojn por ekspluatado, precipe ekde la sesdekaj jaroj ili investis grandan monsumon por industria konstruado kaj petrola ekspluatado en urboj, tiel ke multaj laborfortoj de la kamparo transiris en industriajn fakojn de urboj.

SEKVOJ DE LA ŜVELIĜO

La rapida plimultiĝo de la mondaj loĝantoj kaj la granda ŝveliĝo de la nombro de la urbanoj alportis al ĉiuj landoj serion da problemoj en politiko, ekonomio, socio kaj kultura vivo.

Unue, ili malhelpas la disvolviĝon de la nacia ekonomio kaj la pliboniĝon de la popola vivo. Laŭ statistiko de la Grena kaj Agrikultura Organizo de UN,

reduktiĝis la produktokvanto de greno proporcie al la loĝantoj en 61 landoj, kaj pli ol 100 landoj kaj regionoj dependas de importita greno. La fiŝkapta kvanto de la mondo duobliĝis en la pasintaj 20 jaroj, sed post la sepdekaj jaroj ĝi ne kreskis. Evidente, la rapida plimultiĝo de la mondaj loĝantoj kaj la ŝveliĝo de la nombro de la urbanoj influas rekte la liveradon de greno kaj almanĝaĵoj kaj la progreson de ekonomio kaj socia bonstatigo.

Due, ili kaŭzis ĉiam pli seriozan senlaborecon. Ĉar granda kvanto da homoj koncentriĝis en urboj, precipe ekonomio de kapitalismaj landoj regresis en la lastaj jaroj, ĉiam pli multiĝis senlaboruloj. Kaj tiuj malriĉuloj en urboj plivastigis la areon de barakaj regionoj, kio plue malbonigis la loĝkondiĉojn kaj me-

dion de la urboj. Tiu serioza problemo ekzistas ne nur en la disvolviĝantaj landoj, sed ankaŭ estas malfacile solvebla en la disvolviĝantaj landoj. Kaj krome, la ŝveliĝo de la nombro de la urbanoj kaŭzis atmosferan polucion, bruadon, malfacilecojn en trafiko, akvo-provizo kaj loĝado, mankon de kuraciloj, multiĝon de krimuloj k.a.

TAŬGAJ RIMEDOJ KONTRAŬ TIO

Post kiam okazis en Vankuvero la Loĝada Konferenco de UN en 1976, la malbona influo kaŭzita de la ŝveliĝo de la nombro de la urbaj loĝantoj vekis grandan atenton de diverslandaj registaroj kaj organizoj. Sole en 1980 la Fonduso por Loĝantaroj Aktivecoj de UN okazigis en Romo la simpozion "La Eston-teco de Loĝantaro kaj Urboj", Usono okazigis en Bostono kunvenon, kiun ĉeestis reprezentantoj el 37 grandaj urboj de la mondo, la Centro de Homa Loĝado de UN okazigis en Nagojo la Internacian Konferencon pri Planado de Grandaj Urboj kaj Ilia Administrado, ktp. Tiuj konferencoj diskutis pri la ŝveliĝo de la nombro de la urbanoj kaj ĝia tendenco kaj pri rimedoj por solvi tiun ĉefan problemon. Multaj landoj ellaboris konvenajn politikojn pri tio.

Plejparto de la disvolviĝantaj landoj praktikas ĉefe naskolimiĝon por regi plimultiĝon de urbaj loĝantoj. Samtempe ili atentigas ekvilibron de ekonomia konstruado en diversaj regionoj. Ankaŭ aliaj landoj plibonigas urbajn instalaĵojn por moderigi la malbonan influon de la ŝveliĝo de la nombro de urbaj loĝantoj.



*Antikva strato
de Stokholmo*



NOVAJ SUKCESOJ DE ĈINIO EN LA REORDIGO DE LA NACIA EKONOMIO

La Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio en sia lasta bulteno diris, ke en 1980 la ĉina registaro atingis novajn sukcesojn en la efektiviĝo de la politiko pri reordigo de la nacia ekonomio. En tiu jaro la totala produktovaloru de industrio kaj agrikulturo de Ĉinio estis 661,900 milionoj da juanoj (kalkulate laŭ la senŝanĝaj prezoj de 1970), je 3.2% superplenumis la planon, alivorte je 7.2% plimultiĝis kompare kun tiu de 1979. La enspezo de la nacia ekonomio estis, laŭ unuapaŝa kalkulo, 363,000 milionoj da juanoj, t. e. je 6.9% plimultiĝis kompare kun tiu de 1979. Surbaze de la disvolvo de la produktado pliboniĝis

la popola vivo. Nun la ĉefa problemo ekzistanta en Ĉinio estas: relative granda financa deficino, plimultiĝo de la emisiita papermono kaj prezaltiĝo de nemalmultaj varoj.

ĈINIO PLENUMAS 592 KONSTRUAJN OBJEKTOJN

Inter tiuj grandaj kaj mezgrandaj objektoj 580 estas plue konstruataj kaj 12 ekkonstruitaj en la kuranta jaro.

Ili ĉiuj estas urĝe bezonataj por disvolvi la ekonomion, plifortigi la nacian defendon kaj plibonigi la materian kaj kulturen vivon de la popolo. Pli ol duono de ili estas por malpeza industrio, tekstilo, energio, komunikado kaj konstruaj materialoj. La nove konstruataj hidroelektoj havos kapaciton de 21,000,000 kilovattoj, kaj la novaj karbominejoj ĉiujare povos produkti 78,000,000 tunojn da karbo.

ĈINIO EKSPORTAS ŜIPOJN

En 1980 Ĉinio subskribis kontraktojn kun komercistoj de Usono, Italio, FR Germanio kaj Xianggang (Hongkong) pri eksportado de ŝipoj kun totala kapacito de 580,000 toneloj, inter kiuj estas 11 oceanaj kargoŝipoj ĉiu kun kapacito de 27,000 toneloj kaj 3 kargoŝipoj ĉiu kun kapacito de 36,000 toneloj. En la unua kvarono de la kuranta jaro Ĉinio subskribis kontraktojn pri eksportado de ŝipoj kun totala kapacito de pli ol 200,000 toneloj.

FEKUNDIGO DE BOVINOJ PER FRIDIGITA SPERMO

La nomita tekniko jam estas vaste uzata en la kamparo kaj paŝtejoj de Ĉinio. Ĝis nun en Ĉinio funkcias pli ol 30 stacioj por fridigi spermon kaj pli ol 40 stacioj por likvigi nitrogenon, kiuj ĉiujare povas produkti 5 milionojn da ampoloj de fridigita spermo. En la lastaj tri jaroj 3,240,000 bovinoj estis fekundigitaj per tiu metodo.



FONDIĜIS LA KOMITATO POR LA 100-JARA JUBILEO DE LA NASKIĜO DE LUSIN

En la 21-a de aprilo, fondiĝis en Beijing (Pekino) la nomita komitato kun Song Qingling, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, kiel ĉefkomitatano.

Lusin, granda ĉina literaturisto, naskiĝis en 1881 kaj forpasis en 1936. Liaj verkoj estis tradukitaj en multajn lingvojn kaj distribuataj en multaj lokoj de la mondo.

La unuan sesion ĉeestis pli ol 100 komitatanoj en Beijing. Ĝi decidis, ke okaze de la 100-jara jubileo de la naskiĝo de Lusin oni aranĝu solenan memorkunvenon, simpozion pri studo pri Lusin, ekspozicion pri liaj vivo, verkoj kaj tradukaĵoj kaj tiun de belartoj pri li, eldonos plenan kolekton de liaj verkoj kaj liajn elektitajn verkojn kaj faros prezentadon kaj aliajn aktivadojn.

PLEJ BONAJ ĈINAJ FILMOJ PREMIITAJ

26 plej bonaj ĉinaj filmoj de 1980 estis premiitaj de la Kultura Ministerio de Ĉinio.

Inter ili troviĝas ok rakontaj filmoj, kiel "Nokta Pluvo en Bashan", "Negrestaĵo" kaj "La Homo Negocanta kun Diabloj"; la teatra filmo "La Blanka Serpento-virino"; la bildo-filmoj "Tri Bonzoj" kaj "Neĝa Knabo"; ses

dokumentaj filmoj, kiel "Pejzaĝoj de Huangshan" k.a.; sep scienc-educakaj filmoj, kiel "Vivo kaj Proteino — Sinteza Kristala Insulino", "Verdigo de la Patrolando" k.a.; kaj la dublaĵoj "Oh, Nomugi Toke" kaj "Mia Nomo Estas Amo".

SCIENCISTOJ DE ĈINIO KAJ USONO KUNE ESPLORIS VEGETALOJN

Sciencistoj de Ĉinio kaj Usono kune esploris vegetalojn en la okcidenta parto de Hubei-provinco de Ĉinio kaj lastatempe finis tiun laboron.

Ili kolektis 2,085 numerojn (ĉ. 18,000 ekzempleroj) da sekaj vegetalaj specimenoj, pli ol 600 numerojn da semoj kaj arbidoj, kaj ordigis observajn materialojn pri tieaj vegetalaj sistemo kaj stato. Ili kune ellaboras kaj publikigos raporton pri la esploro.



Semanto de amikeco

de ZHOU MING

LI revenis de la transmara Kanado, kun la amikeco de ĝia popolo. En kvieta vespero de frusomero, li venis al mia hejmo kaj rakontis al mi pri sia vizito al tiu lando. Mi bone memoras, ke en sama kvieta vespero en la pasinta somero, li vizitis min en mia hejmo, ĝoje sciigante, ke li baldaŭ veturos al Kanado por partopreni laŭinvite foiron "La Homo kaj la Mondo". Tio estis lia unua vizito al fremda lando kiel artisto de pasta figurmodlado.

Kiu li estas? Li estas Tang Suguo, filo de la ĉina fama artisto de pasta

figurmodlado Tang Zibo. S-ro Zibo forpasis en 1971. Estas feliĉe, ke Tang Suguo heredis la arton de sia patro. Jam en sia infanaĝo li eklernis de sia patro pastan figurmodladon, kaj ankaŭ diversajn sciojn pri la ĉina tradicia popola arto. Poste li vizitis la Centran Belartan Instituton kaj ricevis tie sisteman edukadon pri belarto. Samtempe kun sia diligenta studado pri la okcidenta skulptado, li disvolvis la ĉinan tradicion pastan figurmodladon, kaj fariĝis elstara artisto de pasta figurmodlado.

Pasta figurmodlado prenas faru-

non kiel materialon, el ĝi oni povas fari pastojn kun malsamaj koloroj por modli diversajn homfigurojn. La lerta artisto bezonas nur kelkajn minutojn por elfari pastan figureton simplan kaj riĉan je nacia karaktero. Ĝi estas kaj metiartaĵo kaj ludilo kun aparta stilo.

Kiel amikaj senditoj de la ĉina popolo, Tang Suguo kaj liaj kolegoj vivis en la maro de amikeco, surteriĝinte sur Montrealon.

Laŭ la difino de la foiro li devis fari en ĝi demonstradon de figurmodlado du horojn ĉiutage, ordinare ekde la dua posttagmezo. Sed jam en antaŭtagmezo aperis longa vico por rigardi lian figurmodladon, kaj ĉiam pli multaj premiĝis ĉirkaŭ li dum la demonstrado. Komence li faris nur simplajn kaj brilkolorajn figurojn, kiuj jam vekis ekstreme grandan intereson ĉe la kanadaj amikoj. Poste, li elektis siajn "modelojn" el la rigardantoj, modlis ilin ĉeloke kaj donacis la artaĵojn al ili. Iutage li elektis el la rigardantoj belan kaj fervoran knabinon kiel sian modelon, kaj modlis por ŝi buston. La vivovera kaj belkolora modlajo kun florbukedo ĉe la kolo multe ĝojigis la knabinon. Ankaŭ aliaj rigardantoj ĝin laŭdegis, iuj eĉ ekkriis pro miro. Nemalmultaj rigardantoj ĉirkaŭ li petis lin modli por si pastan homfiguron.

Tang Suguo faras pastajn homfigurojn en la Internacia Foiro.





Tang Suguo kaj Connie

Tang Suguo profunde kortuŝiĝis de tio. Li neniam atendis, ke la malgranda modlajo estis ne nur komprenata de fremdlandaj amikoj kaj eĉ vekis ĉe ili tiel grandan entuziasmon. Efektive, modli pastan figuron de vera homo estas por li kuraĝa provado! Enlande li modlis nur figurojn de kelkaj homoj. Ĉifoje kuraĝigite de kanadaj amikoj, li decidis modli por ili pli multe da homfiguroj.

Tiel multaj fremdaj amikoj estis liaj plej bonaj modeloj, kio havigis al li bonan ŝancon altigi la arton. Lia patro iam postulis de li, ke la pasta homfiguro devas montri la sintenon kaj karakteron de la modlita homo. Dank' al sia atenta observado al trajtoj, hararanĝoj kaj vestoj de fremdaj amikoj, li modlis multan vivoverajn homfigurojn.

Lia provo sukcesis, kaj lia arto pli kaj pli famiĝis ĉe la loko. Ĉiam pli multaj amikoj venis al li por peti lin fari por ili figuron. Por modligi sian figuron iuj eĉ vizitis lin pli-ol-dekfoje en unu tago. Kiam iu knabeto ĝoje prezentis sian pastan figuron al sia patrino, la lasta kun ĝojo diris: "Kara mia, rapidu hejmen! Ni portu la amikecon de la ĉina popolo hejmen por ke niaj karuloj ĝin rigardu."

Iutage kanada knabino Connie venis al la foiro kaj petis lin per mangestoj, ke li faru por ŝi pastan homfiguron. Kompreninte ŝin, Tang decidis kontentigi ŝian deziron. Post momenta pririgardo al ŝi li rapide modlis la homfiguron. Ho! kiel bela pasta figuro de knabino! Connie ĝoje portis ĝin hejmen, saltante kaj kantante survoje. Ŝi atente metis ĝin sur tablon kaj rigardis foje kaj refoje kun ĉiam kreskanta intereso. "Ha, kiel vivovera!" ĝoje kriis la knabino.

Tang Suguo faras pastajn modlajojn por infanoj.




De tiam ŝi ofte vizitis Tang Suguo kaj parolis kun li pri la arto de la ĉina pasta modlado. Tang trovis, ke ŝi tre interesiĝas pri la nova Ĉinio. Estis videble, kiel ŝi deziregis koni Ĉinion por ŝi tre misteran kaj allogan.

Connie kolektis multajn librojn kaj gazetojn pri Ĉinio kaj komencis legi ilin serioze. Forte kortuŝis Tang Suguo tio, ke ŝi konsultis lin, kiam ŝi renkontis nekomprenaĵojn en la libroj.

Post kiam Tang revenis al sia patrolando, ŝi skribis al li: "... Kelkiam mi rigardis niajn fotojn en mia ĉambro kaj rememoris pri tiu bela somero!..." Ŝi diris, ke de la lasta somero ŝi donas apartan atenton al la informoj pri Ĉinio dum legado de ĵurnaloj kaj rigardado de televidaj programeroj, kaj ŝi jam komencis labori post lernohoroj por akumuli monon por viziti Ĉinion.

Dum la tri monatoj en Kanado Tang Suguo modlis por kanadaj amikoj pli ol 100 homfigurojn, pli ol 200 bestajn figurojn kaj pli ol 80 donacaĵojn. Imageble, kiom da laboro kaj energio li pagis por tio. Li ja estas semanto de amikeco.



EL ĈINA MODERNA HISTORIO

LEVIĜO DE LA KONTRAŬJAPANACISAVA MOVADO

Post kiam la japanaj agresantoj okupis la Nordorienton de Ĉinio kaj starigis marionetan regpotencon de Manĉurio, ili daŭrigis novan agreson al aliaj regionoj de Ĉinio. En printempo de 1933 la japana armeo transpasis la Grandan Muron kaj estis alproksimiĝanta al la nuna Beijing kaj Tianjin. En 1935, sub la instigo de japanaj agresantoj, ĉinaj naciperfiduloj starigis en Tongxian-gubernio (en la nuna antaŭurbo de Beijing) marionetan reĝimon de orienta Hebei-provinco. Sed malgraŭ ke la ĉina nacio frontis pereon, la Nanjing-a Registaro de Kuomintango persistis en kontraŭkomunisma enlanda milito, faris nenian reziston kontraŭ la agresantoj kaj preparis establi marionetan reĝimon "Komitato de Politikaj Aferoj de Hebei kaj Chahaer" kontentigante la pretendon de Japanio. Antaŭ la nacia krizo, studentoj de Beijing faris indignan proteston kontraŭ la perfidaj agoj de la registaro de Kuomintango.

La 9-an de decembro, pli ol 6.000 studentoj rompis la multtavolajn blokadojn de reakciaj trupoj kaj policanoj kaj torentis al la sidejo de la loka registaro de Kuomintango kaj prezentis kontraŭjapanajn patriotajn postulojn. Sed ilia peticio estis rifuzita kaj tio multe indignigis ilin. Ili komencis grandiozan protestan manifestacion. Kontraŭ la senarmaj studentoj, la militistoj kaj policanoj de Kuomintango uzis bastonojn, glavojn kaj fajroestingajn akvokolonojn. En frosta vento la studentoj batalis tutan tagon kontraŭ la subpremantoj. Multaj el la manifestaciantoj estis arestitaj aŭ vunditaj.

Xi-an-a Evento

de BAO JUN

En la sekvanta tago la tuta studentaro de la urbo ĉesis iri al lecionoj.

La 16-a de decembro estis la tago de fondiĝo de la marioneta reĝimo "Komitato de Politikaj Aferoj de Hebei kaj Chahaer". 15.000 studentoj kaj urbanoj de Beijing refoje faris manifestacion. La sloganoj "For la aŭtonomecon de norda Ĉinio!" "Defendu nordan Ĉinion!" "For la japanan imperiismon!" skuis la antikvan urbon.

La bravaj patriotaj agoj de la studentoj de Beijing vekis fortan resonon ĉe la tuta popolo. Ankaŭ studentoj de Hangzhou, Guangzhou, Nanjing, Tianjin, Shanghai, Wuhan, Changsha k. a. lokoj manifestaciis sinsekve. Ankaŭ diverslokaj laboristoj okazigis mitingon por subteni la patriotajn agojn de studentoj. Famuloj de diversaj socitavoloj fondis nacisavan ligan kaj postulis, ke la registaro de Kuomintango ĉesigu la enlandan militon kaj rezistu kontraŭ la japana agreso. La studenta movado de la 9-a de decembro vekis la tutan popolon, kaj tiel puŝis la kontraŭjapanan nacisavan movadon al nova tajdo.

SUB LA INFLUO DE LA KOMUNISTA PARTIO DE ĈINIO

Antaŭ la Evento de la 18-a de Septembro la komandoro de la Nordorienta Armeo Zhang Xueliang (filo de militaristo Zhang Zuolin bombomortigita de japanaj trupoj) plenumis la ne-rezistan politikon de Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek). Li retiris siajn trupojn de la Nordoriento al la Nordo kaj poste liaj trupoj estis senditaj de Jiang Jieshi al la Nordokcidento por ataki la Ruĝan Armeon. En oktobro de 1935, post longa militiro, la centra korpuso de

la Ruĝa Armeo atingis la nordon de Shaanxi-provinco. Tiam Zhang Xueliang funkciis kiel aganta ĉefkomandoro de la "Nordokcidenta Kontraŭbandita Ĉefstabo". Liaj trupoj kun cent mil militistoj ĉirkaŭsieĝis la bazlokojn de la Ruĝa Armeo, sed post tri monatoj triono de liaj trupoj estis ekstermita de la Ruĝa Armeo. Yang Hucheng tiam estis ĉefo de la Nordokcidenta Armeo, ĉefkomandanto de la 17-avoja Korpuso de Kuomintango, estro de la Xi-an-a Paciga Oficejo kaj prezidanto de la registaro de Shaanxi-provinco. En la komenco de 1935 Yang Hucheng havis kelkajn batalojn kontraŭ la Ruĝa Armeo kaj fiaskis senescepte. Pro la senĉesa malvenko kaj edifado de la politiko pri "kuna rezisto kontraŭ la japana agreso", elmetita de la Ruĝa Armeo, Zhang kaj Yang samtempe ekserĉis novan elirejon kaj komencis la "kunan reziston" kune kun la Komunista Partio de Ĉinio.

Kiam la Nordorienta Armeo venis de sia hejmloko al la Nordokcidento, la oficiroj kaj soldatoj profunde kordoloris de la perdo de hejmlokoj, kaj estis forte malkontentaj je la politikoj de Jiang Jieshi, kiu estis fervora por enlanda milito kaj pasiva por rezisto kontraŭ dekstera agreso. Influante de la popola patriota movado kaj la bonaj kondutoj de la Ruĝa Armeo, la oficiroj kaj soldatoj de la Nordorienta Armeo montris pli kaj pli klaran subtenon al la ĝusta propono pri "kuna rezisto" de la Komunista Partio de Ĉinio. Kaj tia inklino de la oficiroj kaj soldatoj infektis Zhang Xueliang. En aprilo de 1936, laŭ la peto de Zhang, la Ĉina Kompartio sendis Zhou Enlai tien por intertrakti. Tio puŝis lin al decido pri kuna rezisto

kontraŭ la japana agreso. En aŭgusto de la sama jaro, la Centra Komitato de la Kompartio sendis la ĉefstabeŝtron de la Ruĝa Armeo Ye Jianying al Xi-an por helpi Zhang kaj Yang en reordigo de iliaj trupoj. Dank' al tio, la Ruĝa Armeo, la Nordorienta Armeo kaj la 17-avoja Korpuso alianciĝis en Nordokcidento surbaze de la Nacia Kontraŭjapana Unuecfronto.

LA EVENTO DE LA 12-A DE DECEMBRO

La subteno de Zhang kaj Yang al la "kuna rezistado" proponita de KPC incitis al Jiang la galon. La 4-an de decembro de 1936, Jiang flugis al Xi-an por trakti la gravan okazajon. Samtempe kun tio Jiang Jieshi sekrete ordonis, ke liaj trupoj kun centmiloj da militistoj moviĝu al la Nordokcidento, kaj kunvokis siajn altrangajn komandorojn en Xi-an. La atmosfero en la Nordokcidento estis streĉa kaj milito estis tuj eksplodonta.

Jiang Jieshi ordonis, ke Zhang kaj Yang movu siajn trupojn al Shaanxi kaj Gansu por ataki la Ruĝan Armeon; alie iliaj trupoj estos translokigitaj al provincoj Fujian kaj Anhui. Zhang kaj Yang decidis persvadi Jiang, ke li ŝanĝu siajn politikojn; alie ili faros perfortan admonon por devigi Jiang Jieshi rezisti al la agreso.

La 7-an de decembro, Zhang Xueliang faris kun larmoj al Jiang Jieshi fervoran kaj kortuŝan admonadon, sed li rikoltis nenion. Jiang montris plenan apation, dirante, ke li neniam ŝanĝos sian politikon ekstermi komunistojn. Trovinte la obstinecon de Jiang Jieshi, Zhang kaj Yang sekrete aranĝis perfortan admonon.

En la frua mateno de la 12-a de decembro, militistoj senditaj de Zhang kaj Yang sieĝis la provizoran leĝejon de Jiang Jieshi. La gvardio de Jiang faris reziston kaj estis komplete ekstermita. Jiang Jieshi sole fuĝis en montan herbejon kaj estis

kaptita de soldatoj de Yang post traserĉado. Ankaŭ dekelkaj altrangaj komandoroj de Jiang en Xi-an estis malliberigitaj. Tiun tagon Zhang kaj Yang telegrafis al la tuta lando kun 8 proponoj, ekz. reorganizi la Nanjing-an Registaron, ĉesigi ĉian enlandan militon, tuj kunvoki nacisavan konferencon por rezisti kontraŭ Japanio, ktp.

LA KONSILIO DE KPC PRI LIBERIGO DE JIANG

La kaptiĝo de Jiang Jieshi skuis la mondon kaj la Nanjing-a Registaro falis en plenan konfuziĝon. La projapana sekto estrata de He Yingqin, milita kaj politika ministro, insistis en milita puno de Zhang kaj Yang, kun la celo mortigi Jiang Jieshi, kaj tiel li povus anstataŭi Jiang Jieshi. Sed la probrita-pro-usona sekto reprezentata de Song Meiling, la edzino de Jiang Jieshi, kaj ŝia frato T.V. Song deziris pacan solvon por savi Jiang Jieshi. Ili oponis precipe bombardon de Xi-an. Kaj tiel estiĝis akra konflikto inter la du sektoj.

En la sama tago de la evento Zhang kaj Yang telegrafis al la Centra Komitato de KPC, ke ĝi sendu delegacion por interkonsiliĝi pri la nacisava afero kaj la okazaĵo. La Centra Komitato de KPC konsciis, ke Jiang Jieshi tenas plej altan povon super la armitaj fortoj kaj la registaro de la lando, kaj mortigo de Jiang estigos novan enlandan militon, kaj tio estas la plej dezirata de la japanaj agresantoj. Se oni liberigos Jiang kun la premiso ke li konsentos rezisti kontraŭ Japanio, la nacia kontraŭjapana unuecfronto povos esti pligrandigita kaj unuanima kontraŭjapana situacio sen enlanda milito povos aperi pli frue. Kun la konsidero de paca solvo la Kompartio sendis tien la delegacion estratan de Zhou Enlai. La delegacio atingis Xi-an je la 16-a de decembro.

En la 22-a de decembro la reprezentantoj de la Nanjing-a registaro

T.V. Song kaj Song Meiling atingis Xi-an. Post dutaga intertraktado la tri flankoj venis al interkonsento. Jiang Jieshi vole nevole konsentis armisticon, kuan reziston kontraŭ Japanio kaj liberigon de politikaj malliberuloj kaj ordonis, ke la Kuomintangaj trupoj okupiĝantaj pri la enlanda milito retiriĝu el la provincoj Shaanxi kaj Gansu. Vespere de la sama tago Zhou Enlai interparolis kun Jiang. Jiang certigis siajn konsentojn kaj proponis plian intertraktadon en Nanjing. La 25-an Jiang estis liberigita, kaj tio markis pacan solvon de la Xi-an-a Evento. La saman tagon Jiang refluĝis al Nanjing en akompano de Zhang. Sed la perfidema Jiang tuj malliberigis Zhang post lia atingo de Nanjing, kaj poste murdis generalon Yang Hucheng.

LA DUAFOJA KUNLABORO INTER KUOMINTANGO KAJ KPC

Post la Xi-an-a Evento, en la nomo de KPC Zhou Enlai havis intertraktadon kun la Nanjing-a Registaro de Kuomintango kaj senĉese vojaĝis inter Xi-an, Nanjing kaj Yan-an por ĉesigi la enlandan militon kaj efektiviĝi kuan reziston kontraŭ Japanio. En februaro de 1937 Kuomintango okazigis sian trian sesion de la Kvina Centra Komitato por reguligi siajn politikojn en la rilatoj kun KPC kaj Japanio. En la 10-a de februaro la Centra Komitato de KPC telegrafis al la sesio elmetante 5 postulojn, kiaj "ĉesigi ĉian enlandan militon, koncentri ĉiujn fortojn de la lando por rezisti al la deekstera agreso", kaj samtempe faris al Kuomintango 4 garantiojn, ekz., "forlasi en la tutlanda sfero la politikon de arma ribelo celantan renversi la Kuomintangan Registaron". La tria sesio de Kuomintango akceptis la proponojn de KPC, kaj tiel aperis la politika situacio de la duafoja kunlaboro inter Kuomintango kaj KPC, kio malfermis la vojon al la tutpola rezisto kontraŭ la japana agreso.



La festivalo de ĝingpo-oj

de QU WEIBO

KIAM la norda parto de Ĉinio ankoraŭ estas kovrita de neĝo kaj atakata de frosta vento, ĝia suda parto tamen prezentas tute malsaman bildon. En la Dehong-a Taj-a kaj Ĝingpo-a Aŭtonoma Subprovinco en Yunnan (Junnan)-provinco ĉe la sudokcidentaj landlimoj ĉie riĉas verdaĵoj kaj pompe disfloras rododendroj kaj kamelioj — regas printempo.

Guste en tiu sezono mi venis tien por vizito. La koncerna departemento de la subprovinco rekomendis al mi iun ĝingpo-an oficiston kiel mian voĵgvidiston kaj interpretiston. Ni kune veturis per aŭto al Ĝingpomonto por partopreni en la grandioza kanta kaj danca festivalo de la ĝingpo-oj, kiu okazas ĉiujare.

Kurante laŭ malebena montvojo nia aŭto eniris en senliman primiti-

van arbaron. La vojo en la montoj kun danĝeraj rokoj fariĝis pli kaj pli malfacila. La aŭto limake spiralis supren kaj nefacile atingis la montsupron ĉirkaŭitan de blankaj nuboj. Ni rigardis de alte kaj vidis la montojn proksimajn kaj malproksimajn vestitajn per verdaj arbaroj. Kaj en tiu nebulplena valo, profunde en la arbaro, sin trovas vilaĝoj de ĝingpo-oj.

La aŭto malsupreniris kaj atingis vilaĝon ĉirkaŭitan de pizangoj kaj bambuoj — jen la loko kiun ni volas viziti.

Kiam ni estis elaŭtiĝontaj, grupo da ĝingpo-aj knabinoj venis al ni kun rido kondukate de maljunulo. Unu el ili elprenis verdan bambuan tubon kun diametro de 20 centimetroj kaj longeco de 80 centi-

metroj el la korbato dorse portata de la antaŭiranta knabino, kaj alia elprenis “pokalon” el baŝoa folio, plenigis ĝin per vino el la tubo kaj proponis al mi, dirante: “Ni ĝingpo-oj havas jenan moron, ke ĉiu gasto el kiu ajn nacieco veninta de kiu ajn loko por pasigi kune kun ni la feston, estas rigardata kiel nia amiko, se li eltrinkas tiun pokalon da vino, kaj li estas bonvenigata de ni. Nu, estimata gasto, trinku la vinon pro via feliĉo!”

Mia akompananto jam survoje rimarkigis min: “La ĝingpo-oj estas malkaŝemaj kaj tre gastamaj. Je la unua intervidiĝo la mastro, antaŭ ĉio, certe prezentos al vi bovlon da vino. Se vi ne akceptus ĝin, tio ja signifus, ke vi malestimus ĝingpo-ojn. Tial, kiam oni prezentos al vi vinon, neniel rifuzu.” Mi ja neniam prenis vinon. Por respekti ilian moron, mi eltrinkis du bovlojn da vino unu-foje. Tion vidinte, la aĝulo diris ĝoje: “Brave, vi estas amiko de ni ĝingpo-oj. Tranoktu ĉe mi hodiaŭ, mi petas. Nu, tiel decidite...”

Pasis la nokto. Ekbolis la vilaĝo jam en la frua mateno. Tio estis la unua tago de la festivalo. Aŭdiĝis senĉese gongado, tamburado kaj klakado de petardoj. La ĝingpo-oj en festaj kostumoj kantante kaj dancante venis el la ĉirkaŭaĵo de dekoj da kilometroj al la loko kie okazos la festivalo.

Inter la partoprenantoj la junuloj kun blanka turbano garnita per brile

Ĝingpo-aj knabinoj



ruĝa kvasto sur la kapo, sako oblikve sur la maldekstra ŝultro kaj longa glavo sur la dekstra ĉiuj aspektas bravaj. La knabinoj en bluzo el nigra veluro kun multaj kunkudritaj brilantaj arĝentaj ornamajoj kaj bunta ŝaflana jupo, portantaj kolorajn bidojn sur sia brusto kaj arĝentajn kolĉenon kaj brakringojn kun desegno ĉiuj prezentas ĉarmon.

Je la oka matene inaŭguriĝis la festivalo. Oni ekpafis al la ĉielo kaj komenciĝis tamburado, gongado kaj trumpetado samtempe. Vico da bele vestitaj ĝingpo-inoj kun dorse portata korbo venis prezenti vinon al la gastoj.

La festivalo estis aranĝita en ronda placo ĉirkaŭita per malalta bambubarilo, kiu povas enteni milojn da personoj. Ĉe la enirejo staris ornamita arko. En la mezo de la placo staris 20-metra festivalstango, sub kiu estis metitaj en vico ok gongoj kaj unu tamburo kun diametro de du metroj. Apud ili estis kvar longaj tabuloj kun belaj koloraj bildoj simbolantaj la solidarecon de la ĝingpo-oj, riĉan rikolton de greno kaj prosperon de brutoj. Sur unu el la tabuloj estis pentrita Himalaya-montaro, kiu laŭdire estis la naskiĝloko de la ĝingpo-a nacieco. Inter du tabuloj metiĝis kruce du glavoj, simbolan-

taj la sentimecon kaj refleksesblecon de la ĝingpo-oj.

Kvar altprestigaj maljunuloj el la vilaĝoj gvidis la dancon de la festivalo. Ili, vestitaj per brodita robo kaj bela ĉapo kun bekforma viziero kaj pavaj plumoj, ludadis brilantan longan glavon. Ĉe la kapo de la dancantoj ili dancis vigle sin turnante jen dekstren jen maldekstren. Aliĝis al ili pli kaj pli multaj homoj, kaj fine formiĝis longa vico de dancantoj. Ili batis piede la takton de la melodio kaj tiel dancis sur la placo krietante de tempo al tempo "oje, oje..."

Plej bone dancis la virinoj, kiuj svingadis poŝtukojn kaj ventumilojn en bruado de tamburo kaj gongoj, malpeze batante la takton manklake kaj dancante ĉirkaŭ la viroj. Iliaj dancmovoj estis belaj, kvankam simplaj. La belaj jupoj flirtis en vento, kaj la arĝentaj ornamajoj tintadis dum ilia dancado kaj jen kaj jen ekbrilegis en la suno.

Mi interesiĝis pri la pavaj plumoj sur la ĉapoj de la dancgvidantaj maljunuloj. Mi demandis iun maljunan ĝingpo-on, kial oni portas tion. Li rakontis al mi jenan legendon: Antaŭ tre tre longe la gepatroj de la mondkreinta heroo de la ĝingpo-oj Ning Guanwa diris al li: "Post nia morto vi benu


niajn animojn per festivalo, ke ni transformiĝu en teron, sur kiu vi vivos kaj generos." Sekve Ning Guanwa pensis pri vojaĝo al la Suno por lerni tie la festival-dancon. Iutage la sendito de la Suno venis inviti la bestojn de la tero al festivalo en la Suno. Ankaŭ la birdoj partoprenis en la festivalo kaj ellernis la dancon. Reveninte sian hejmlokon, ili ekripozis apud arbeĝo kun maturiĝintaj fruktoj. Tiam bela turto proponis unue danci la festival-dancon kaj poste kune ĝui la bongustajn fruktojn. Ĉiuj aprobis ĝian proponon kaj elektis la pavon kiel la gvidantan dancanton. Disetendinte siajn belajn plumojn, la pavo komencis gvidi ĉiujn en dancado — tiel okazis la unua festivalo sur la tero. Kortuŝite de la belaj, vivoplenaj kantoj kaj dancoj, Ning Guanwa lasis okazigi festivalon en la homa mondo ĉiujare. Ekde tiam la maljunuloj, kiuj gvidas la dancon, devas porti pavajn plumojn sur sia ĉapo.

La festivalo estas ne nur solena okazaĵo por la ĝingpo-oj ĝenerale, sed ankaŭ bona ŝanco por amindumo de la ĝejnuloj.

Subiris la suno, tamen ne laciĝis la ĝejnuloj, kiujn okupis la taga

Spinado

La festivalejo





La internacia flor-merkato

de YE SHIXIONG

Ĉiuj popoloj amas florojn, sed laŭ malsamaj moroj. En Eŭropo kaj Ameriko donaco de karmezinaj rozoj al alia sekso estas simbolo de amo. Al funebrantoj oni devas donaci senodorajn florojn. La angloj ne ŝatas ruĝajn kaj blankajn florojn, kaj la francoj siringojn. La japanoj aparte ŝatas krizantemojn, dum la italoj opinias, ke ili simbolas malbonon. La nederlandanoj prenas tulipojn kiel la naciajn florojn... Laŭtakske la mondo ĉiujare elspezas pli ol dek miliardojn da usonaj dolaroj por la floroj, kio estas vere mirinda!

La floroj sur la internacia merkato povas esti dividitaj ĉefe en kvar kategoriojn: Unue, freŝaj floroj, t.e. detranĉitaj tigoj kun burĝonoj, kiuj povas esti metitaj en florvazojn por portempa aprezado aŭ kunplektitaj en bukedojn aŭ

florkorbojn por donaco. Due, potfloroj, t.e. floroj plantitaj en potoj, al kiuj apartenas ankaŭ envazaj miniaturaj pejzaĝoj. Sed plej granda baro por enkonduki la potflorojn en la internacian merkaton estas grundo, ĉar ĉiuj importaj landoj de potfloroj faras rigoran kvarantenon al grundo. Trie, floroj kun elterigitaj tuberoj. Ili povas esti longe konservataj kaj floras nelonge post ilia enakviĝo. Al tiu kategorio apartenas narciso, tulipo, lilio kaj aliaj. Kvare, sekigitaj floroj, t.e. senakvigigitaj freŝaj floroj. Ili povas fariĝi ornamoj post prilaborado kaj returniĝi en freŝajn florojn post enakviĝo. El ili la floroj dianto, krizantemo, tulipo, lilio kaj orkido havas grandan debiton.

Nederlando estas la plej granda eksportanta lando de floroj en la mondo, kaj ĝia nacia floro tulipo

videblas ĉie en la mondo. Ĝi uzas elektronikajn ekipaĵojn en kulturado de floroj por reguligi akvo-ŝprucigon, insekto-mortigon, sterkadon, sunumadon, temperaturon, humidecon kaj aliajn. Floro-kulturantoj aŭkcias floro-mendilojn pere de borso. Post interkonsento pri prezo la aĉetanto povas ricevi la menditaĵojn en 15 minutoj. La transportado povas esti plenumita per malvarmokonserve ŝarĝaŭto aŭ aviadilo. Ekz. usonaj floristoj, kvankam loĝantaj trans la oceano, povas havi tre freŝajn ekzotajn florojn posttagmeze de la sama tago.

Ankaŭ Japanio estas lando de floramantoj. Ĝis nun cirkulas la floraranga arto en Japanio. La japanoj aparte ŝatas krizantemojn, kiuj konsistigas 40% de la totala vend-kvanto de freŝaj floroj en tiu lando. Ankaŭ lilio kaj aliaj floroj kun tuberoj estas ŝatataj de ili. La japanaj envazaj miniaturaj pejzaĝoj estas stampitaj per sia nacia kulturo kaj estas ŝatataj ne nur de sia propra popolo sed ankaŭ eksportataj al la eŭropa merkato. Por arbarizi la urbojn kaj ornami hejmajn ĝardenojn en la lastaj jaroj Japanio importis grandan kvanton da floraj plantidoj kaj arbidoj, kiaj rododendro, kamelio, acero, ginko kaj kamforarbo. Singaporo kaj Tajlando kulturis kaj eksportas ĉefe orkidojn, kiuj famiĝas tra la mondo pro siaj bonodoro kaj multeco de la specioj kaj vendiĝas eĉ en Eŭropo kaj Ameriko.

kantado kaj dancado. La junuloj kaj la junulinoj arope iris en arbaron. Tie ili faris kampfajrojn kaj reciprokis belajn kantojn. La nokta vento alportis malvarmeton, tamen en iliaj koroj flamis amo. Post interŝanĝoj de amkantoj, la junuloj ekludis fluton kaj la

junulinoj elprenis el sia sino harmonikon malofte ludatan en ordinaraĵoj kaj komencis ĝin ludi kun brako sur alies ŝultro. Tiel ili esprimis unu al alia sian amon per plaĉa muziko, milda kiel flustro. La sceno estis malfacile priskribebla per kelkaj vortoj.

KOREKTO

1. Sur p. 41 de n-ro 5, la klarigoj de la subaj du bildoj devas esti interŝanĝitaj.
2. P. 34, 1-a linio por n-ro 6 "YUSTYB KUZMA" estu legata "JUSTYN KUZMA".

Sensitiv-flora festo de Jugoslavio

de YING XIU

En vintro la verda akvo de Adriatiko gaje plaŭdas kontraŭ la plaĝo. Milda Mediteranea klimato, kvieta kaj ĉarma pejzaĝo kaj komforta turisma servo altiras turistojn por ripozo. En la marborda antikva urbo Hercegna ĉiujare estas okazigita Sensitiv-flora Festo aparte por vintraj turistoj.

Sensitiv-floroj estas delikataj flavaj floretoj, similaj al grapoloj da travideblaj perloj. En januaro, kiam en plejparto de Jugoslavio regas frostoj kaj blanka neĝo kaj kiam oni ne povas trovi eĉ spuron de floroj, la sensitivo sola pompe floras. Oni diras, ke tiuspecaj florarboj kreskas nur en Hercegna kaj aliaj sudaj partoj ĉe la marbordo de Adriatiko. Tial oni multe kulturis tiujn arbojn. De 1970 oni okazigas amuzan aktivadon ĉiujare en la tempo de sensitiv-florado.


Sur montdeklivoj pompe floras sensitiv-arboj, kiuj, rigardate de malproksime, tre similas al orflava nuba maro. Ke la gastoj persone kolektas sensitiv-florojn, tio estas la ĉefa aktivado de la Festo. Knabinoj prezentas al la gastoj vinon kaj figojn de tempo al tempo en la gaja muziko. Poste ĉiuj, ambaŭmane tenante ĉarmajn sensitiv-florojn, sekvas orkestron laŭ la bordo. Unu 5-6-jara knabineto iras ofte ĉe la kapo de la orkestro. Sur la arboj apudvoje flirtas multaj koloraj flagoj. Virinoj bruligas branĉetojn por friti fiŝetojn. Ankaŭ manĝi fiŝetojn estas unu el la programeroj de la festo. Ĉiu ajn povas preni platan teleron, pece-

tojn da pano, frititajn fiŝetojn kaj glason da vino. Ili manĝas kaj trinkas. La fiŝetoj estas duondonacitaj de ĉelokaj fiŝistoj, la vino — preparita de ĉirkaŭaj loĝantoj. Tio ebligas al la floro-kolektantoj manĝi iom da bongustajoj kaj ripozi post longa irado. Tia interesa

aktivado estas agrabla al loĝantoj en urbego aŭ internaj lokoj. Ofte ĉ. 4,000 homoj partoprenas en la aktivado. Ili kaj manĝas kaj aprecas la prezentadon de kantoj kaj dancoj, kaj estas tre kontentaj pri la aktivado.

Post kiam falas vespera krepusko, okazas maskobalo konkursa. Ĉiu gastoj rajtas baloti por sia ŝatata maskoportanto, estas premiitaj la gajnintoj de plej multaj voĉoj. Centoj da maskoportantoj iras tien kaj reen ĉirkaŭ la tabloj de la gastoj. La partoprenantoj gaje faras siajn rimarkigojn. Tiklataj de la balo, iuj gastoj aŭ memvole aŭ invitite aliĝas al la dancantoj. La balo daŭras ĝis la sekvanta frumateno.

Sen titolo



de SUN SHOUBO


AŜMA

(Rakonto en versoj)

(10Es-253S)

Redaktita kaj tradukita el la sania lingvo en la hanan de la Guishan-a Laborgrupo de la Yun-nan-a Popola Kultura Ensemblo

Rearanĝita de la Kunming-a Filio de la Ĉina Verkista Asocio



Esperantigis Laŭlum

Ilustris Huang Yongyu

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Beijing,
Ĉinio

16 × 18cm. 84 paĝoj

Prezo: £0.95 US\$1.95

Mendu ĉe Libroservo de UEA;

Peranto de EPC;

aŭ Esperanta Sekcio de Guoji Shudian,

P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Rava kaj Ĉarma

La vortojn “rava” kaj “ĉarma” mi kutime taksas se ne evitendaj almenaŭ evitindaj, sed mi sentas bezonon apliki ilin respektive al la bildaro kaj teksto de “Aŝma”.

Aŝma estas balado tradicia por la sania popolo kaj restas la plej populara versrakonto ilia, ankoraŭ kantata dum festoj.

Temas pri gefratoj Aŝma kaj Ahej, kaj iliaj aventuroj kaj penoj kontraŭ la malbonulo Rabubala. Kiel en ĉiuj fabeloj kaj rakontoj tiaj la bonuloj estas belaj kaj bravaj, la kanajloj malbelaj. En tio ĝi estas universala kaj sekvas universalan vojon. Okazas konkuroj inter la heroo kaj la malheroo, kiujn fine gajnas la heroo malgraŭ la ruzoj kaj perfidaj agoj de la malamiko. Tamen troviĝas interesaj diferencoj pro la saniaj moroj, ekz: saniaj geadoleskuloj “loĝas respektive en porviraj kaj porvirinaj komun-domoj, kie ili povas sin amuzi per kantado kaj dancado aŭ amindumi”.

“Vi amu kiun vi bonvolas
Nek panj’ nek paĉjo vin ekĝenos
La amon kiu vin konsolas
Nek panj’ nek paĉjo intervenos.”

Jen modelo por gepatroj tra la tuta mondo, sed bedaŭrinde tiu idilio rompiĝas, kiam venas la tempo por edziniĝo, kaj Aŝma estas forkaptita de la fia Rabubala. Sekvas rakonto pri la streboj de frato Ahej savi ŝin, sed la finon mi ne malkaŝos.

La versoj estas verkitaj en stilo, kiu elvokas popolan etoson. Oni atingas efektojn foje per ŝanĝoj aŭ neglataĵoj en la ritmo, foje per ripetado, kiel en refreno de popolkanto, sed kun subtilaj varioj kio evitas monotonon, ekz. jen: “Se mi ne povas antaŭdiri/Mi pasintaĵojn tamen konas”, jen: “Se mi ne povas antaŭdiri/Mi estintaĵojn tamen konas.”

Fine mi substreku la belan prezenton. Eĉ ne unu preseraron mi rimarkis, kaj la ilustraĵoj estas — jes, ravaj!

DAFNE LISTER, brita esperantisto, maj. aŭg. 1980

La kanto kaj danco de ujuguroj

Fotoj de YAN JIN

30em Zzz

La ujugura nacieco havas historion de pli ol 2,000 jaroj. Ĝi nombras pli ol 5,400,000 membrojn, kiuj vivas ĉefe en la Xinjiang-a Ujugura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio.

Ĝi havas sian originalan kulturon kaj arton. Frue antaŭ 1,700 jaroj ĝia muziko jam renomiĝis. La ujuguroj estas lertaj en kantado kaj dancado. Iliaj dancmovoj belaj kaj facilaj karakteriziĝas per rapida rotacio kaj variemo. En festotagoj la ujuguraj viroj kaj virinoj ĉu junaj aŭ maljunaj ĝoje kantadas kaj dancadas, kio montras ilian serenan, vigan kaj gajan karakteron.

La solo



La solo "Bredistino de Silkraŭpoj"



Dueto de kanto-danco



Arhatoj en




Qiongzhu-templo sin trovas sur Yu'an-monto en la okcidenta antaŭurbo de Kunming, Yunnan-provinco, Ĉinio. Tie la 500 brilkoloraj kaj plastike vivo-veraj statuoj de arhatoj estis faritaj en 1885-1891.

Tiuj statuoj havas altan nivelon de skulpturo. Ili estis kolorriĉe kaj intense farbitaj, karakterizante la tradicion farbadon de la ĉinaj antikvaj skulptaĵoj. Iliaj pozoj kaj sintenoj estas malsamaj kaj versimilaj. Plejparto de ili havas korpan proporcion de homo, kaj iliaj vestoj kaj la religiaĵoj en iliaj manoj montris karakterojn de malsamaj arhatoj. Tiuj valoraj skulptaĵoj estas bone konservataj.



Qiongzhu-templo

de QU WEIBO



漓江春雨 庚申之夏 澄莹室主 画于 画堂

